REGo

☆ RUSIA ESPERANTO-GAZETO ☆

movada revuo en kunlaboro kun REU ***№ 2 (57) aprilo 2010***



en la numero

invitoj al AERo, GelERT kaj SES

fremdaj lingvoj en la vivo de Nikolaj Kuznecov

IJK 2011 – en Ukrainio!

proverboj kaj kluba laboro

kio furoris en 2009?

"La verdaj folioj de somero"

"Bulteno de REU", novaĵoj, anekdotoj kaj multo alia

Moskvo, 2010

enhavo

01 La lango ne turniĝas diri tion ruse (A.Gonĉarov)
02 Altaja Esperanto-Renkontiĝo
03 IJK 2011 – en Ukrainio!
03 GelERT-2010
05 Fremdaj lingvoj en la vivo de Nikolaj Kuznecov (V.Opletajev)
09 Proverboj kaj kluba laboro (A.Gonĉarov)
13 Ankoraŭ pri la historio de E-movado (B.Zozulja)
15 Naciaj diraĵoj E-veste (parto 7)
22 UEA retenis la membronombron
23 Vizito al la Centra Oficejo en 1990
23 Voĉdonado komenciĝis en UEA
24 REU-membroj por 2010
25 Danko al la donacintoj
25 Kotizoj de REU/REJM por 2010
27 SES-2010
27 La studentoj de la tria aĝo festis la jubileon de Vasilij Eroŝenko (A.Titajev)
28 Venontaj renkontiĝoj
29 Forpasis Umberto Broccatelli
29 1450 adresoj en Pasporta Servo
30 Nova retgazeto en Litovio
30 Muzikaj novaĵoj
32 "La verdaj folioj de somero" (traduko de L.Novikova)
33 Nova ĉapitro el "La urbo Goblinsk" (M.Bronŝtejn)
04, 26 Anekdotoj
k3 Kio furoris en 2009?



Ljubovj Karpeta rakontas pri V.Eroŝenko dum la jubilea kunveno en Vladivostok

REGo
(Rusia Esperanto-Gazeto)
№ 2 (57) aprilo 2010
aperadas ekde 2000

redaktas **Garik Kokolija**
kunredaktas **Viktor Aroloviĉ**
kunlaboras **Maksim Griŝin**

materialoj de REGo povas esti represataj, kondiĉe ke la tekstoj restos senŝanĝaj kaj estos indikita la fonto

poŝta adreso: Pjatnickoje ŝosse 45 – 105
125310 Moskvo, Rusio
retadreso <gazeto@mail.ru>

abontarifoj por 2010:

por loĝantoj de Rusio kaj aliaj landoj de KSŜ – 350 rubloj sendendaj al:
Коколия Георгий Владимирович
Пятницкое шоссе 45 – 105
125310 Москва

por loĝantoj de aliaj landoj – 20 eŭroj pagendaj al la konto ***kklg-r*** *ĉe UEA*

KIO FURORIS EN 2009?




La ekzerclibreto *Poŝamiko* de B.Allée kaj K.Kováts estis la plej furore vendita libro en la Libroservo de UEA en 2009. Ĝia vendonombro (392) estis preskaŭ duoblo de la klasika lernolibro *Ĉu vi parolas tendare?* de Renato Corsetti kaj Mauro La Torre (213 ekz.), kiu post longa pauzo regajnis altan lokon dank' al mecenata aĉeto por afrikanoj. La tria estis *Vojaĝo en Esperanto-lando* de Boris Kolker (179 ekz.), la plej populara Esperanta libro en la lastaj jaroj, kaj la kvara – *Esperanto de nivelo al nivelo* (167 ekz.), ekzercilo por ekzamenoj laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro, redaktita de Márta Kovács.

Aparta statistiko pri unuekzempleraj vendoj donas pli nuancitan bildon pri la efektiva populareco de la titoloj en 2009. La nombrojn de entutaj vendoj ĉefe determinas la kvantaj mendoj de aliaj libroservoj, kiuj evidente pluvendis nur parton de siaj aĉetoj al unuopuloj jam pasintjare. En la alia statistiko venkis *Esperanto de nivelo al nivelo* (51), kio eĉ pli elstarigas la sukcesan starton de la novtipaj ekzamenoj de UEA.


La Libroservo vendis sume por 113 298,47 eŭroj, t.e. je 11 809,15 eŭroj (9,4%) malpli ol en 2008 (125 107,62). La malkreskon ĉefe klarigas fenomeno konata el membrostatistikoj, la "kongresa efiko": en 2008 dum la Roterdama UK la vendoj sumiĝis je 40 504 eŭroj, sed en Bjalistoko same multe da kongresanoj butikumis por 29 000 eŭroj (-11 504).

Entute la Libroservo vendis 15 049 unuopajn librojn aŭ aliajn varojn (13 707 en 2008). La nombro de venditaj titoloj estis praktike sama: 2560 anstataŭ 2554 en 2008. Ĉar UEA stokas ĉ. 5500 titolojn, iom pli ol duono el ili do allogis neniun aĉetanton dum la tuta jaro. Ankaŭ la nombro de klientoj apenaŭ ŝanĝiĝis: 653 anstataŭ 662. La Libroservo plenumis 1620 mendojn; averaĝa kliento mendis do 2,5-foje.



Vendoj entute (nombro, titolo, aŭtoro, prezo en eŭroj):

392 *Poŝamiko* (B.Allée & K.Kovats) 5,10
213 *Ĉu vi parolas tendare?* (R.Corsetti, M. La Torre)* 4,80
179 *Vojaĝo en Esperanto-lando* (B.Kolker)* 18,00
167 *Esperanto de nivelo al nivelo* (M.Kovács) 10,50
121 *Pocket Esperanto Dictionary* (A.McLinen)* 15,00
112 *Monumente pri Esperanto* (H.Röllinger)* 7,50
106 *Utila Estas Aliĝo* (U.Lins)* 15,00
100 *Vivo de Zamenhof* (E.Privat)* 9,00
91 *Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA* * 4,50
88 *Konciza klarigo pri la landnomoj en E-o*




(A.Löwenstein) 0,90
78 *Internacia Kongresa Universitato 2009* (Red. J.A.Vergara)* 15,00
65 *Faktoj kaj fantazioj* (M.Boulton)* 13,80
63 *Saluton!* (A.Childs-Mee)* 10,80
62 *Naturaj vortordoj en Esperanto* (W.Jansen)* 4,50
61 *Elektitaj paroladoj kaj prelegoj* (I.Lapenna)* 9,90
61 *Konciza etimologia vortaro* (A.Cherpillod)* 21,60
61 *Ŝlosilo angla (A Key to Esperanto)* 0,60
58 *Homarano* (A.Korĵenkov) 27,00
58 *La Zamenhof-strato* (R.Dobrzyński) 18,00
53 *Malkovru Esperanton* (E@I) 1,50
53 *Komputeko* (Y.Nevelsteen) 6,00

Vendoj unuekzempleraj:

51 *Esperanto de nivelo al nivelo* (M.Kovács) 10,50
39 *Utila Estas Aliĝo* (U.Lins)* 15,00
30 *Morto de artisto* (A.Löwenstein) 18,90
30 *Vojaĝo en Esperanto-lando* (B.Kolker)* 18,00
28 *Beletra Almanako 4*: 9,90
27 *La Asocio* (Z. van Dijk) 22,80
25 *Homarano* (A.Korĵenkov) 27,00
25 *Plena ilustrita vortaro de Esperanto* 90,00
23 *La origino de specioj* (K.Darvin) 22,80
23 *Pasporta Servo, listo de gastiganto*j* 15,00
22 *Beletra Almanako 6*: 9,90
22 *Concise Encyclopedia of the Original Literature of E-o* (G.Sutton) 48,00
21 *Konciza klarigo pri la landnomoj en E-o* (A.Löwenstein) 0,90
21 *Plena manlibro de Esperanta gramatiko* (B.Wennergren) 27,90
20 *Esperanto estas...* (dvd) 4,50
20 *Naturaj vortordoj en Esperanto* (W.Jansen) 4,50
19 *Esperanto Mini-Course* 1,50
18 *Beletra Almanako 5*: 9,90
17 *Konciza etimologia vortaro* (A.Cherpillod) 21,60
16 *La ŝtona urbo* (A.Löwenstein) 22,80
16 *Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA** 4,50
(* eldonaĵoj de UEA/TEJO)

Gazetaraj Komunikoj de UEA



En la antaŭa numero de nia revuo (REGo, № 1 (56), februaro 2010, pp. 7-9) Aleksandr Ŝevĉenko aperigis artikolon, kiu enhavis ankaŭ iom da rememoroj pri infanaj jaroj de lia filo – denaska esperantisto. La temo "denaskismo" vokis intereson ĉe la legantoj, tial la redakcio de REGo decidis prepari apartan materialon pri la spertoj kaj impresoj, rilataj la denaskulojn. Ni petas tiujn el la esperantistoj, kiuj havis infanojn – denaskajn esperantistojn, sendi al la adresoj de REGo siajn rememorojn pri la edukado de tiaj infanoj, rilataj al tio problemoj, iuj interesaj okazoj el tiu periodo. Krome, estas preparita speciala demandaro por la denaskuloj mem. Ni sendos ĝin al denaskaj gesamideanoj, por poste publikigi iliajn respondojn. Ni petas la denaskulojn, kiuj konsentas respondi la demandaron, kontakti la redakcion por ricevi ĝin. Ĉio ĉi estos publikigata en sekvaj numeroj de REGo. Ĉi tie ni represas kun la afabla permeso de Anatolo Gonĉarov lian artikolon, unue aperintan antaŭ pli ol dek jaroj en la revuo "Literatura Foiro".

LA LANGO NE TURNIĜAS DIRI TION RUSE

Jam dekok jarojn mi ne loĝas kune kun mia filo, kiun mi celis denaska esperantisto. La tre malofta fenomeno de esperanto-denaskismo devigis min preni la plumon por komuniki la sperton, miajn sukcesojn kaj malsukcesojn.

Alparoli la fileton en esperanto mi komencis ekde lia alveno el la naskejo. Dank' al la severa memdisciplino (nenion diri ruse; kaj poste – ne kompreni lian rusan) mi havis brilan starton. Kiam li fariĝis unujara ni ekkonversaciis esperantlingve. Samkiel ĉe la instruado al plenkreskuloj, mi parolante ofte kreis ridindajn situaciojn: novaj vortoj ŝercoride enkapiĝas multe pli firmaj. Sed du miaj samurbaj amikoj-esperantistoj jam de la komenco ne sukcesis: krom esperante, ili parolis kun la infanoj fojfoje ruse. Rezulte, la infanoj ĉion bone komprenas en esperanto, sed responde ĉiam glitas al la rusa lingvo. En la kapo de la denaskulo la bildo de la patr(in)o devas esti firmege ligita nur al esperanto.

Mi tre bedaŭras ne havi tempon noti ĉiujn interesajn lingvaĵojn de la filo. Nepardoneble! Multo forgesiĝis, sed mi rememoras la jenon. Foje mi diris al la filo: *Jen estas kemia uzino. – Jes,* – konsidereme rediris la filo, – *kevia uzino*. – *Ne, filĉjo, kemia... – Mi komprenas, kevia...* Necesis aparta klarigo. Kaj iam kvarjara li kun miro sciigis foje: *Paĉjo, ĉi tie el trueto io elskarabis*. La frazon mi ofte mencias dum miaj prelegoj pri esperanto. La nocio *elskarabis* en la rusa revorteblas same per unu vorto kaj signifas t.n. infanan lingvon – do neserioza, neuzata en la literaturo.

Siatempe mia instruisto de esperanto diris, ke ellasi la artikolon *la* ne estas tiom grava peko. Dum la unuaj miaj jaroj kiel esperantisto ankaŭ la vorton *sia* mi uzis ne ĝuste. Post du-tri jaroj da alparolo al la filo, mi komprenis la gravecon de *la* kaj la ĝustan uzon de *sia.* Sufiĉe pene kaj longe mi korektis min, sed la filon necesis korektadi dum kelkaj jaroj. Jen kiel gravas alparoli la denaskulon senerare!

Daŭre sentiĝis la problemo pri hejmaj terminoj. La filo ŝatis manlabori kaj por pluraj maninstrumentoj mankis terminoj. Se ni kunturistis – mankis nomoj por pluraj floroj. Oni devis ellabori propran hejman terminaron.

Ege mankis infanaj libroj. Mi devis adapte traduki ruslingvajn legaĵojn. Sed

kiam mi komencis instrui lin legi en esperanto, mi ne sukcesis. Nu, eble ankaŭ mi ne tiom insiste instruis la esperanto-legadon, ĉar ofte mankis tempo, sed estis, laŭ mi, du kaŭzoj. La unua – li jam scipovis legi ruse kaj ĉiam (kiel ajna infano) glitis al pli malpeza (lego)laboro. La dua – sentiĝis la manko de infanaj libroj en esperanto. Mi opinias, ke oni devas legoinstrui al denaskuloj esperante antaŭ ol nacilingve. Nu, kaj necesas multigi la libro-oferton al la denaskuloj. Tial ankoraŭ nun aktuale staras la neceso verki, traduki, eldoni por niaj denaskaj esperantistoj.

Liginte la filon al la lingvo, mi ne ligis lin al Esperantio. Ĉiam mankis mono, ofte eĉ por miaj proesperantaj veturoj mi prunteprenis. Nur la lastan jaron, kiun ni loĝis kune, mi veturigis la filon al esperanto-tendaro. Tiam li estis jam 15-jara. Kiom grandis liaj okuloj spertante esperantistan etoson, ke fine li diris: “Paĉjo, kial vi neniam prenis min al esperanto-tendaroj?”.

Baldaŭ mi devis forlasi la familion kaj liaj ekkonatiĝoj kun esperantistoj ne estis daŭrigitaj. Nun la filo ne sentas sin esperantisto, esperanton li parolas nur kun mi, ne ofte. Do, mi komprenis, ke ne sufiĉas nur la instruado. Endis ekde frua aĝo enkonduki lin en nian esperantan mondon (eblas eĉ diri, en nian etnon).

Jam tiutempe mi sentis bezonon je reto de la denaskulaj gepatroj, kiu helpu min per interŝango de sperto en la esperanto-edukado. Ankoraŭ aktuala estas la grava tasko eltrovi kaj helpi izolitajn esperanto-gepatrojn, ĉar nur en Rusio mi konas plurajn tiajn, pri kies ekzisto neniu scias.

Post kiam la filo, jam studento, ekloĝis en mia urbo, eknecesis, ke ni (fojfoje) parolu la rusan lingvon. Sed baldaŭ ni konstatis, ke post la ruslingva komenca parolo, ni ĉiam transiras al esperanto. Plurfoje ni ambaŭ celis kapti la momenton de tiu ekŝango, sed neniam sukcesis. Je nia amuza miro! Nur post duonjaro da niaj sporadaj, tamen preskaŭ ĉiusemajnaj renkontiĝoj, ni interparolis (kiam necesis) konstante la rusan lingvon. Tamen, kiam necesas nomi min *paĉjo* ruse, mia filo ĉiam diras tion nur esperante. La lango ne turniĝas diri tion ruse...

Anatolo Gonĉarov (Krasnojarsk)
“Literatura Foiro”, 166, (apr. 1997), p. 93-94

ALTAJA ESPERANTO-RENKONTIĜO (AERo-2010)

Dum TEMoj-2009 en Tiĥvin oni proponis organizi sekvan Esperanto-renkontiĝon en Altajo. Altajaj esperantistoj certe ŝatas Esperanto-gastojn. Do, karaj geamikoj, konatoj kaj nekonatoj, ni invitas vin al AERo por la jaro 2010. Kompreneble, ni ŝatus akcepti ankaŭ eksterlandajn gastojn post la Azia Esperanto-Kongreso, okazonta en Ulan-Bator. Lige kun tio, ni proponas okazigi AERon ĝuste post tiu aranĝo. Ni planas kelkajn fakojn, organizotajn helpe de REU.

Ni esperas je rapidaj reeĥoj kun proponoj por la programo. Bonvolu plenigi kaj sendi la aliĝilojn rete aŭ paperpoŝte laŭ adresoj: ***Isakov Sergej Jurjeviĉ*** (rete: <cdobry118@mail.ru>; poŝte: 656019, г. Барнаул, ул. Гущина, 167-118); ***Jaskov Gennadij Jakovleviĉ*** (rete: <rw9ye@mail.ru>; poŝte: 656037, г. Барнаул, ул. Северо-Западная, 29-76); ***Fazilbekova Alfija Asgatovna*** (rete: <asgatovna@mail.ru>; poŝte: 656008, г. Барнаул, ул. Левобережная, 7).

Nun – pri la proponataj kondiĉoj.

Loko: Ripozejo "Birjuzovaja Katunj", situanta en Altaja Montaro surborde de la rivero Katunj en pitoreska loko. Ni garantias freŝan aeron de vera pinarbaro, puran malvarman akvon en la rivero, konvenan nutradon kaj loĝkondiĉojn... Nur la etoso dependas de ĉiuj partoprenontoj.

Tempo: Ekde la 26-a de junio ĝis la 4-a de julio 2010.

Aliĝkotizo: infanoj ĝis 10 jaroj – senpage; studentoj, emeritoj – 150 rub; plenaĝuloj – 250 rub. Mondonacoj por la Organiza Fonduso estas bonvenaj.

IJK 2011 – EN UKRAINIO!

TEJO ĝojas anonci, ke la 67-a Internacia Junulara Kongreso okazos en Ukrainio. Tio estis decidita dum la lasta reta estrarkunveno. Temo proponita por la kongreso estas "Stabila evoluo – nova koncepto por la homaro". La aranĝo okazos julie 2011 proksime de Kievo, ĉefurbo de Ukrainio. La organizan teamon kreos UkrEA (Ukrainia Esperanto-Asocio) kaj ULEJ (Ukraina Ligo de Esperantista Junularo). Tio estos la unua IJK en Ukrainio. La kongresejo troviĝas proksime de la Kieva akva rezervejo. Cetere, la 66-a Internacia Junulara Kongreso okazos ĉi-jare en Kubo. Pliajn informojn pri ĝi serĉu ĉe <http://www.ijk-67.retejo.info/ĉefpaĝo>.

(TEJO-aktuale)

Disponeblaj loĝkondiĉoj: Duetaĝa 60-loka hotelo kun trilokaj ĉambroj, laŭ kosto – proksimume 400 rub. por loko. Necesejoj kaj duŝejoj situas en ĉiu etaĝo. Varma akvo disponeblas dum tuta diurno. La manĝejo situas apud la hotelo, kie trifoja manĝado provizore kostas 360 rublojn. Pro rapida kresko de provizprezoj la definitiva prezo por la manĝoj estos anoncata en alia informilo.

Ĉar la kvanto de lokoj en ĉambroj estas limigita, ĉe distribuo de tiuj avantaĝon havos la unuaj sinanoncintoj.

Demandojn kaj programproponojn bonvolu sendi al supre menciitaj adresoj.

Telefonoj por urĝaj demandoj: +7-913-2158950 (Sergej Isakov, ankaŭ eblas kontakti lin per SKYPE: cdobry1), +7-913-0973210 (Gennadij Jaskov).

La aliĝo ekvalidas post ricevo de la pago por loĝado. La pagon bonvolu sendi poŝtmandate al: ***Фазылбекова Альфия Асгатовна***, 656008, г. Барнаул, ул. Левобережная, 7.

La Duan Informilon vi ricevos post la aliĝkonfirmo. **Bonvenon al AERo!**

La Organiza komitato

GelERT-2010

Krasnodara E-organizaĵo nome de E.A.Bokarev invitas ĉiujn rusiajn (kaj ne nur) esperantistojn partopreni en GelERT-2010 (Gelenĝika Esperantista Renkontiĝo Turista) – komuna ripozo kaj aranĝoj ĉe la bordo de la bela Nigra maro en ĉarma ĉemara vilaĝo Betta (Бетта), en kurorta distrikto Gelenĝik. Tiu vilaĝo troviĝas 5 km for de la vilaĝo Krinica (Криница), kie okazis GelERT-2009, kaj ĉirkaŭ 45 km for de la urbo Gelenĝik, ĉe pitoreska mara golfeto, ĉirkaŭita de montoj kaj arbaroj. Tie estas bela, pura mara akvo, bonegaj plaĝoj, bona busa trafiko.

La LOĜADO eblos en meblitaj lignodometoj (po du, kvar litoj en ĉambroj) de

privata ripozejo. Prezoj estas sufiĉe moderaj – 300 rub. por unu tagnokto.

MANĜI eblos en proksimaj kafejoj (400 – 500 rub. tage).

TEMPO: de 10.07.2010 ĝis 18.07.2010 – la ĉefa periodo, sed eblos laŭdezire ankoraŭ daŭrigi ripozon tie.

La PROGRAMO multe dependos de la alvenontoj, memproponoj estas akceptataj. Eblas organizi ekskurson al dolmenoj, akvofaloj aŭ Gelenĝik-centro, se estos dezirantoj. Nepre estos paroligaj kursoj por komencantoj, gitarludo, kantadoj. Vi povos kaj bonege ripozi ĉe la maro en unu el la plej belaj sud-rusiaj kuraclokoj, kaj perfektigi viajn E-konojn, esti semajnon (aŭ pli) en verda rondo samideana.

La TRAFIKO: per trajno ĝis Novorossijsk aŭ Krasnodar. Poste – per la busoj: Krasnodar-Betta, Krasnodar-Gelenĝik ĝis Pŝada (Пшада), poste per la buso Pŝada – Betta (ĉ. 10 km). De Gelenĝik la busoj ekveturas de la malnova aŭtostacio ĝis Betta (45 km). Ĉiujn alvenintojn ni renkontos kaj akompanos ĝis la ripozejo, se vi anticipe informos pri via alveno laŭ la telefonnumeroj: +7-918-1704520 aŭ +7-918-1829227. En Gelenĝik ankaŭ ekfunkciis flughaveno, eble el viaj loĝurboj ankaŭ estos aviadila trafiko tien.

La adreso de la bazejo: Геленджикский район, п. Бетта, ул Речная, 7.

Por garantii la lokojn en la ĉambroj necesas ĝis 20.05.2010 sendi pagon por unu tagnokto (300 rub.). Monon por sekvaj tagoj eblos pagi surloke julie. Tamen tiu antaŭpago ne estas repagebla, se iuj ne venos por la renkontiĝo. Kaj tiu pago ne estas aliĝkotizo, ĉar por GelERT-2010 tiu ne ekzistas.

Avertintaj partoprenantoj de la aranĝo, kiuj venos sen antaŭpago, ne restos sen loĝlokoj, sed ili lokiĝos en iu najbara privata ripozejo.

La antaŭpagon – 300 rublojn por ĉiu partoprenanto – bonvolu sendi al: 350000 Krasnodar-centro, abonkesto 5, Ivasenko Anatolij Ivanoviĉ.

Aliĝo al GelERT-2010 eblas rete ĉe la ttt-ejo de REU: <http://reu.ru/index.php?parto=eventoj> kaj per retpoŝto al <krasnodaro@gmail.com>.

Detalojn, proponojn – laŭ la supre indikitaj telefonnumeroj.

Anatolij Ivasenko, la ĉeforganizanto

DANĜERA MISIO

En la laborejo.

Kruko: Banĉjo, mi havas apartan mision por vi.

Baniko: Ĉu ĝi estas aventureca?

Kruko: Nu, jes. Por statistiki la vendadon de nia varo ni sendas dungitojn al ĉiuj kvartaloj de Berval-Urbo. Mi jam faris la riĉulan kvartalon, do mi sendas vin al la malriĉula. Jen la formularoj, kaj jen prenu mian skribilon.

La sekretariino, intervenas: Sed Kruko, tiu estas la plej misfama parto de la urbo. Tio estas fakte tre danĝera misio! Baniko eble ne revenos.

Kruko: Aĥ, vi pravas. Baniko, redonu al mi la skribilon.

(E-anekdotoj)

FREMDAJ LINGVOJ EN LA VIVO DE NIKOLAJ KUZNECOV

Antaŭ sesdek ses jaroj, fine de la Granda Patrolanda milito en Ukrainio pereis homo, kies reala nomo dum lia vivo estis al nemultaj konata, ĉar lia biografio intence kaj malintence estis multe falsigita per ekzotikaj legendoj kaj diversaj mitoj. Li senkompromise kaj konscie foroferis sian vivon por la Granda Venko kaj metis siajn plurajn talentojn por la justa liberiga afero. Al li postmorte estis atribuita la plej alta honora titolo de la lando – Heroo de Soveta Unio. En la popola memoro Nikolaj Ivanoviĉ Kuznecov dum postmilitaj jardekoj restas fama kiel unu el la plej elstaraj militaj skoltoj, sentima punpafisto, partizana agento, granda patrioto. Multaj aŭtoroj verkis librojn pri lia sekreta agado, konigante interesajn faktojn kaj detalojn el la biografio de ĉi tiu neordinara homo, trairinta dum sia nelonga aventure riĉa tridektrijara vivo grandegan vojon de ordinara provinca knabeto ĝis heroa abnegacia patrujdefendanto. Apartan atenton meritas kaj estas rekomendataj por interesega legado la esploroj de la historiisto Teodor Kirilloviĉ Gladkov, kiu studis la vivovojon de Kuznecov ĝis plej etaj detaloj. Teodor Gladkov emfazas ofte en siaj libroj kaj intervjuoj lingvajn kapablojn de Nikolaj Kuznecov, sen kiuj ne eblus lia sukcesa sekreta kariero. Provojn esplori esperantistan vivperiodon de la heroo entreprenis en la 70-80-aj jaroj de la pasinta jarcento ankaŭ Aleksandr Kalaŝnikov (Tjumenj) kaj Viktor Kloĉkov (Jekaterinburg).



Nikolaj Ivanoviĉ Kuznecov (27.07.1911 – 09.03.1944) naskiĝis en la rusa familio de ordinaraj kamparanoj el la provinca urala vilaĝo Zirjanka, vizitis lernejon en la urbeto Talica, studis en la transurala siberia urbo Tjumenj, laboris en Kudimkar kaj Sverdlovsk (nun Jekaterinburg). Li estis aktiva komsomolano kaj konscia komunisto. Jam ekde junio 1932 Nikolaj agis kiel speciala sekreta agento de OGPU NKVD[1]. Laŭ la opinio de Teodor Gladkov li akceptis la proponon fariĝi etata agento dank' al sia sincera kaj verva patriotismo kaj nelastvice pro junaĝa romantikemo kaj ambicio.

Nikolaj, kiun denaske oni nomis Nikanor, Nikoŝa, Nikeŝa, Nika, estis tre kapabla infano. Li frue eklegis kaj ĉiam estis pasia kaj serioza leganto posedinta propran sistemon de la librolegado: li akurate listigis ĉiujn tralegitajn librojn, analizis agojn de protagonistoj. Tre frue Nikeŝa elmontris lingvajn kapablojn. Por lernado de fremdaj lingvoj li havis ankaŭ proprajn regulojn, kiuj mirinde plene kongruas kun postuloj de la moderna komunika lingvodidaktiko: neniam enpense fari tradu-

[1] OGPU NKVD – Unuigita ŝtata politika administracio – sekreta esplorservo de Popolkomisarejo pri internaj aferoj.

kojn el la denaska lingvo, ne timi ĉiajn erarojn, paroli laŭeble rapide, ne kroĉi sin strikte al gramatikaj reguloj. Tiu ĉi praktike elprovita metodika principaro tre helpis lin dum la lernado de la germana lingvo.

Nikolaj estis talenta lingvemulo, kaj liajn kapablojn sukcese evoluigis Nina Nikolajevna Avtokratova, instruistino de la germana kaj franca lingvoj en la sepklasa lernejo de Talica. Ŝi estis edukita en Svislando kaj povis peri al sia lernanto tre kvalitajn lingvokonojn. Multaj samklasanoj de Kuznecov konsideris strangaĵo liajn okupojn pri la germana lingvo, sed malgraŭ ilia malkomprenemo li obstine perfektiĝis en la ĉiutaga popola lingvo praktikante babiladon kun la metiinstruisto Franz Jawurek, estinta militkaptito, kaj kun la apoteka farmaciisto aŭstro Krause. Depost 1934 Nikolaj Kuznecov laboris en la fama uzino "Uralmaŝ" kaj tre aktive kontaktis, cetere kun difinitaj celoj, germanajn specialistojn kaj inĝenierojn, kiuj tiam, lastajn jarojn antaŭ la militeksplodo multnombre oficis en uralaj uzinoj. Ĉiam elegante vestita, kapabla konduti mondume, sprita, ĉarma kaj tre sociema, Nikolaj similis al etna rusdevena germano kaj akiris multajn amikojn en la germana kolonio de Sverdlovsk. En ĉi tiuj jaroj li tre serioze lernis ne nur normigitan literaturan varianton de la germana lingvo, sed ankaŭ ĝiajn dialektojn, kaj rezulte de sia daŭra lingva perfektiĝo li kapablis dum la milito babili en ses diversaj germanaj dialektoj. Parolante kun germana oficiro li povis identigi lian devenregionon en Germanio kaj tuj transiri al lia loka dialekto. Dum la aŭdienco kun Erich Koch, imperia komisaro kaj ĉefguberniestro de la tuta Ukrainio, li parolis en ties dialekto, kaj la germano sen ia ajn dubo opniis lin sia samlandano.



Krom la lingvo li aparte intertesiĝis pri la vivmaniero de la germanoj, iliaj tradicioj kaj kulturo, legis gazetojn kaj librojn, spektis filmojn alproprigante al si ecojn de alinaciano interalie ne sen grandaj aktoraj talentoj, ĉar lia transformiĝo al germana ĉefleŭtenanto Paul Wilhelm Siebert dum la partizana agado en la urbo Rovno estis perfekta kaj neniam provokis suspektojn flanke de la okupantoj. Notindas eksterordinare miriga fakto, ke Kuznecov malgraŭ sia plena "germaniĝo" neniam vizitis Germanion kaj neniam estis profesia militisto.

Kiam en 1925 Kuznecov estis lernanto de la sepa klaso, Sergej Aleksandroviĉ Suetin organizis en Talica por lernejanoj kaj studentoj de forsta teknikumo rondeton de Esperanto. Nikolaj, forte entuziasmigita de la loga ideo komunikiĝi kun la

tuta mondo pere de la komuna lingvo – "latino de la proletaro", – fervore eklernis Esperanton kaj tre baldaŭ montris mirindajn sukcesojn. En 1926 li ekstudis en Tjumenj en la agronomia fakultato de la agrikultura teknikumo kaj tuj ligiĝis kun tieaj esperantistoj, kies societo troviĝis ĉe Irkutskaja strato 17. La klubon, laŭ iuj opinioj ĝi estis rondeto, estris jura konsultisto de Tjumena ŝipkompanio Georgij Nikolajeviĉ Besedniĥ, kaj kunvenojn vizitadis ĉirkaŭ 40 plenkreskuloj, plejparte ili estis gekolegoj de la klubgvidanto. La klubsidejo troviĝis en malnova ligna dometo, kies korta enirpordego estis dekorita per la oficiala sovetia esperantista emblemo– ruĝa cirklo, en la mezo de kiu videblis verda stelo kun la orlitera siglo SEU[1]. Nikolaj tre rapide amikiĝis kun tjumenaj esperantistoj, legis librojn el la kluba biblioteko, kie li trovis jam konatajn al si el la kurso de Suetin klasikajn lernolibrojn de T.Cart kaj E.Peltier, kaj laŭ la rememoroj de Georgij Besedniĥ babilis en Esperanto senĝene kaj rapide kiel en la patrolingvo. Li tre progresis en la lernado de Esperanto, fariĝis lingva helpanto de la kursestro, kaj dum unu el la klubkunvenoj la junulo mirigis la ĉeestantojn voĉleginte al ili propran tradukon de sia plej ŝatata poemo de Lermontov "Borodino". En Tjumenj Kuznecov fariĝis membro de SEU ricevinte membrokarton kun la numero 47001.




Novaj tjumenaj esperantistoj de la sepdekaj jaroj interesiĝis pri la historio de Esperanto en sia urbo en la komenco de la pasinta jarcento, kaj tiucele Aleksandr Kalaŝnikov dufoje en 1973-1974 vizitis la urbojn Talica kaj Sverdlovsk, kie li renkontiĝis kaj interparolis kun G.N.Besedniĥ kaj Viktor Kuznecov, la frato de Nikolaj, vizitis la muzeon de Nikolaj Kuznecov ĉe la uzino "Uralmaŝ" por sciiĝi pri detaloj de antaŭkvindekjara vivo kaj aktivado de tjumenaj esperantistoj kaj por precizigi faktojn el la esperantista vivo de la estonta Heroo de Soveta Unio. Georgij Besedniĥ, rigore instruita de la vivo, ne tre volonte, kun ioma porcio de suspektemo, kontaktis tjumenajn studentojn, kvankam sincere ĝojis pri la nova esperantista generacio en la siberia urbo. Pri la nun bone konata fakto, ke proletaj esperantistoj de Tjumenj partoprenis en la festa manifestacio la 7-an de novembro 1926 kun la slogano skribita en Esperanto "Vivu la 9-a jaro de Granda Oktobra revolicio!", membroj de la klubo "Revo" informiĝis el la interpa-

[1] SEU – Sovetlanda (poste – Sovetrespublikara) Esperantista Unio (1921 – 1938)

roloj kun R.N.Sokolovskij, instruisto de la latina lingvo en medicina instituto, kaj el lia artikolo “Ankoraŭfoje pri Esperanto” publikigita en la tagĵurnalo “Tjumenskaja pravda” la 20-an de oktobro 1967. Sendube, inter la manifestantaj esperantistoj en la strato de Respubliko – la ĉefa urba strato – paŝis ankaŭ Nikolaj Kuznecov, aktive engaĝita en ĉiuj poltikaj aferoj. Laŭ R.N.Sokolovskij, kiu verŝajne estis konata kun iamaj tjumenaj esperantistoj de la tridekaj jaroj, la juna Nikolaj mem iniciatis pretigon de la slogano en Esperanto kaj mem fiere portis ĝin en la vico de samideanoj.

Iuj precizaj faktoj, ke Nikolaj Ivanoviĉ uzis Esperanton poste, antaŭ 1937 aŭ dum la milito, ne estas konataj, sed, bone lerninte Esperanton en sia juneco, li ne povis tute forgesi la lingvon, kiun li certe ŝatis. Malgraŭ kelkaj hororaj persekutaj ondoj kontraŭ esperantistoj en Soveta Unio, la kono de Esperanto neniel damaĝis la karieron de Kuznecov. Oni rakontas ke iutage hispanoj, militintaj en la partizana taĉmento “Venkantoj” de Dmitrij Medvedev en Ukrainio, plendis al li pri Kuznecov, kiu estis kaŝcele nomata Graĉov, ke tiu bone komprenas iliajn nacilingvajn parolojn. Ĉu ne Esperanto helpis lin kompreni la hispanan lingvon?



Nikolaj Kuznecov laboris ĝis la somero 1934 kiel arbartaksisto en la urala urbeto Kudimkar. En ĉi tiu periodo li memstare ellernis la malfacilan por li komian lingvon (kiu apartenas al la finnougra lingvogrupo kaj estas por rusoj sufiĉe malfacile perceptebla) ĝis tia grado, ke li eĉ povis verki en ĝi versaĵojn. En tiu tempo tute ne ekzistis lernolibroj de la komia-perma lingvo kaj ĝia skribo estis tiam nur kreata. Li mem verkis por si vortareton kaj gramatikon de la komia lingvo kaj multe parolis kun loĝantoj de la distrikto, ĉar li konsideris tre grava komunikiĝi kun aborigenoj en ilia gepatra lingvo. Eĉ denaska komi-permano Andrej Kilosov, konata en Sverdlovsk violonfaristo, opiniis sen duboj, ke Kuznecov estas lia sampopolano, ĉar tiel perfekte li regis ĉi tiun lingvon. Nikolaj ŝatis ne nur parkeri vortojn kaj kompreni parolon en fremda lingvo, sed ankaŭ eksperimenti alilingve kaj ĝui guston de nova por li lingvaĵo skribante en ĝi tekstojn aŭ rimante vortojn.

Loĝante en la urala ĉefurbo Sverdlovsk Nikolaj konatiĝis kun aktorino de la urba teatro, kiu estis polino laŭ la nacieco, kaj dank’ al ĉi tiu romano li ellernis la polan lingvon. Dum sia restado en Ukrainio li bone ekparolis ukraine, kaj ambaŭ slavaj lingvoj kondiĉis sukcesojn en liaj kontaktoj kun tieaj loĝantoj kaj partizanaj kunbatalantoj.

En la jaroj de la milito estis tre alte aprezataj la skoltaj atingoj de Kuznecov, gravegaj informoj, kiujn li akiradis dank' al siaj personaj kontaktoj kun germanaj oficiroj kaj oficistoj de la okupacia administracio. Dum pli ol 16 monatoj ekde la 19-a de oktobro 1942 ĝis la 9-a de marto 1944 li sukcese aktivis sub la falsa nomo inter malamikoj en ilia malfronto. Li precize lokalizis orientan rezidejon "Werwolf" de Hitler apud Vinnica, sciigis Centron[1] pri speciala batalgrupo ligita kun Otto Skorzeny, kiu ektrejnis en la Karpata montaro por prepari atencon kontraŭ aliancaj ŝtatestroj kunvenontaj en Teherano aŭtune de 1943. Li malkovris planojn de hitleranoj pri preparata ofensivo de germanaj trupoj somere de 1943 ĉe Kurska fronta arko (operacio "Citadelo"). Li eksciis sekretegajn datumojn pri germanaj raketoj "V-1" kaj "V-2" – la famaj hitleraj armiloj de revenĝo. Li realigis propramane plurajn punekzekutojn de altrangaj germanaj oficiroj kaj generaloj de okupaciaj trupoj en Ukrainio pafmortigante ilin sur stratoj de Rovno kaj Lvivo.

Kio estis li, Nikolaj Kuznecov? Ĉu nur aŭdaca, sagaca, talenta kaj riskema agento? Ĉu li estis ordinara homo edukita de la sovetia propaganda sistemo kaj centprocente fidela al ĝi? Ĉu li estis honesta kaj patriota civitano preta sin oferi por la bono de la lando? Kiel finiĝis do lia vivovojo? Al ĉi tiuj kaj multaj aliaj demandoj ne ekzistas unusencaj respondoj. Estas klare, ke temas pri homo neordinara, kaj tion elokvente pruvas lia vivo. Partizanaj kamaradoj de Kuznecov rememoris liajn intencojn kaj revojn ekokupiĝi postmilite profesie pri lingvoj kaj lingvistiko. Bedaŭrinde, krudaj militaj cirkonstancoj direktis liajn kapablojn, ankaŭ lingvan talenton, servi al taskoj situantaj tre malproksime for de sciencaj lingvistikaj interesoj.

Ni esperantistoj omaĝas al Nikolaj Kuznecov ne nur pro liaj dummilitaj heroaĵoj sed ankaŭ pro lia sincera rilato al Esperanto, ĉar la internacia lingvo de Zamenhof estis por li signifoplena objekto studinda samkiel ajna etna lingvo, kiun li plezure kaj serioze lernis.

Vladimir Opletajev (Surgut)

PROVERBOJ KAJ KLUBA LABORO

Bedaŭrinde tre malmultaj ekdeziris ekzerci sin je tradukado kaj fakte je elementa versumado sur la paĝoj de *REGo*. Sed la publikaĵon mi ne opinias vana. Mi proponas al e-kluboj fari la proverbotradukon konstanta aŭ ofta programero. Mi spertis, ke en Sankt-Peterburga e-klubo iam tiu ero estis unu el la sukcesaj kaj vigle partoprenata. Por semajna pripenso necesas doni nur 1-2-3 sed ne pli da proverboj. Ĉe la kunveno ĉiu defendas sian traduk-varianton argumentante, kompreneble e-lingve. Fine ĉiu voĉdonas por sukcesa liaopinie varianto.

De 10 ĝis 20 minutoj da kluba tempo estos interese pasigitaj. Mi, cetere, ĉiam skribis detalan programon de la kunveno kaj kiom da minutoj (proksimume, certe) ĉiu programero okupu. Estis e-movadaj novaĵoj, novaĵoj el persona vivo de la klubanoj (ofte ene de duopoj interŝanĝataj), recitado aŭ laŭtlegado de versaĵoj, iuj vort-(aŭ aliaj)ludoj, diskuteto pri iu problemo, rerakonto de interesaj informoj de

[1] Centro – Centra stabo de sovetia ekstera esplorservo en Moskvo.

eksterlandaj amikoj ktp. ktp., kaj fine nepre minimume 1-2 e-kantoj. Neniu, eĉ ne mi mem, rimarkis kiel pasis la duhoro.

Iutempe mi hazarde trovis en Interreto jenan opinion:

Какое-то время Anatolo жил в Питере – и я довольно часто с ним общался ĉeeste, persone. А ещё он замечательно вёл клуб. Foje mi sopiras pri lia klubo – ĉio estis tiom facila... Nur venu dimanĉe, kaj vin atendas preta interesa programo, plene Esperant-lingva, vere paroliga ktp... (Hamstro)

Atentu oni, ke tiu klubo, mi-gvidata, funkciis en 2002, kiam multaj e-aktivuloj “metis krucon” sur la kluban vivon, same kiel nun:

VM: Mi faras mian laboron k vidas utilon de ĝi. Sed vi (samkiel ekz. A.Gonĉarov) plu perdas fortojn, obstine agante laŭ maniero de antaŭ 100 jaroj – ĉar vi ne komprenas, ke la mondo nun estas tute alia, ol en la epoko de “pioniroj”...

VM: Vi (k Gonĉarov) neniel povas kompreni, ke ekde 1985 la mondo esence ŝanĝiĝis. Nun klubo delonge ne plu estas ĉefa formo de E-movado. Fakte, tiu formo estas formortanta.

Tiujn citaĵojn mi prenis el la retlisto <reu-agado>, ili apartenas al Valentin Melnikov, kiun mi vidas en la kunvenoj (!) de moskva e-klubo ĉiun mian viziton al Moskvo.

La entombigantoj de la e-klubo ne komprenas, ke kunvenoj tutegale okazas ĉie tra la mondo ĉu de hobiuloj, ĉu de verkistoj... ĉu en superlernejoj por lerni ion ktp, ktp. Ankaŭ la e-kluba kunveno estas la sama, sed la enhavon, ho jes, oni bezonas alian, ol antaŭ 100 jaroj... Do, fakte VM pravas nur pri la enhavo de la klubaj kunvenoj, sed ne pri formo (bombono kaj la bombonpapero).

Mia ĉefmotivo estas, ke la klubanoj (dum la kunvenoj, aranĝoj, kunveturoj ktp) vivu en Esperanto la samon, kion ruslingve (kaj ripozo, kaj laboro, kaj studoj kaj amuzoj, festoj ktp... nur ne negativaĵoj!). Tiam formiĝos la dua homo ene de ĉiu klubano. Tiuj duaj e-homoj formos ĉiu por si kaj por la kolektivo la duan vivon, kies e-lingvaj sistemoj ne havas negativaĵojn (malbonaj faroj, trompoj, sakroj, perfidoj, krimoj ktp), kiel la gepatra lingvo. La konduto de la homo estas enplektita en la lingvan sistemon (fakte memorsistemon) formante alian homon. Se la klubgvidanto ne uzas alkoholon, do formiĝas la respektiva senalkohola e-kolektivo (kvankam en la ruslingva medio oni povas uzi alkoholaĵojn). Tio estis ekz. en miaj e-kluboj, la odesa, la barnaula, la moskva kaj la mallongtempa sankt-peterburga. Tio (en la 60-aj) transiris en SEJM-ajn SEJT-ojn, kie eta grupo de alkoholuzantoj devis kaŝe nokte trinki siajn alportitajn botelojn (en la kantoj de M.Bronŝtejn ĉifronomitaj “libroj”), sed tage ĉie regis teumo. Tio, ke lingvo kaj la kulturo en la lingvo ne estas disigeblaj, estas konata fenomeno, atestata de la jena citaĵo:

Post iom da tempo en Okcitanio mi rimarkis, ke okcitanlingvanoj ŝajne kondutas pli malĝentile, ol franclingavnoj. Ili multe uzas fivortojn kaj sakraĵojn kaj laŭtvoĉe. Male, kiam oni uzas la francan, oni estas ekstreme ĝentilaj. Viro salutinta per ĝentila “bonan tagon sinjoro”, same salutis okcitane per esprimo kiel: “Mil Dioj! He! Vi! Ĉu ĉio bone? Fek’ al Di’! Putinista putinido!” Ĉio dependas de la

uzata lingvo.[1]

Sed ne necesas la programon de kluba kunveno fari ekstreme interesa. Tiam al la sekva (temas pri la ĉiusemajnaj) kunveno povas veni nemultaj. Mi longege "rompis la kapon" pri la kialo kaj trovis la respondon nur antaŭnelonge konatiĝinte kun la hindia teorio (kaj praktiko) de ĉakroj – energetikaj centroj ĉe ĉiu homo. Rakontote kadre de iu e-aranĝo, ĉar revue tio malfacilas pro la limigita spaco kaj neeblo tuj respondi demandojn.

Finante la kluban temon mi akcentu, ke nur tiam la e-klubo bone vivas, kiam troviĝas homo, kiu dediĉos sin je klubgvidado serioze kaj eltroveme. Ke tio ne oftas, atestas same neoftaj bonfunkciantaj kluboj...

Prelude al la proverba parto de la artikolo mi respondu la rimarkon (manleteran) de Klara Ilutoviĉ, ke necesas orientiĝi al la *Esperanta proverbaro*, ke pli bone ol Zamenhof ne eblas traduki. Mi ne samopinias. La matureco de e-lingvaĵo dum tiu jarcento da uza praktikado videble altiĝis. Krome Zamenhof ne ĉiujn proverbojn rimis. Sekve oni povas nur kompari la elektitan klube traduk-varianton al tiu de Zamenhof, se ĝi ekzistas.

Kaj nun mi prezentu la venintajn traduk-variantojn kun miaj komentoj, kiel ekzemplo de dumklubaj komentoj.

La tradukojn alsendis Klara Ilutoviĉ (plu K.I.), Stanislav Kotljarov (S.K.), Nikolao Neĉjaev (N.N.) kaj Anatolo Gonĉarov (A.G.). Ne ĉiu tradukis ĉiujn 5 proverbojn.

1 – Без труда не вытащишь (и) рыбку из пруда:

N.N. *Eĉ kapt' de fiŝeto subtila, ne estas laboro facila.*

A.G. Estas bona la traduko, nur la vorto *subtila* iom agacas. Laŭ PIV ĝi signifas: *konsistanta el tre maldikaj kaj delikataj eretoj.*

S.K. *Sen peno ne venos beno;* aŭ *Sen laboro ne venos oro;* aŭ *Sen pena ago oni ne eltiros eĉ fiŝeton el la lago.*

A.G. – En la du unuaj mankas rusesko, la rusa spirito, mankas ŝlosilaj vortoj. Almenaŭ tiel: *Sen labor ne venos fiŝa or'* – jam estus iom pli bone. La tria varianto estas jam tute fidela al la originalo, nur iom interrime longa.

K.I. *Sen laboro ne kapteblas leporo;* aŭ *Sen streĉa ago ne kapteblas la fiŝ' en la lago.*

A.G. La unua varianto estas sennacia aŭ internacia, kaj la dua estas tute normala niakaze, ĝi peras la rusan menson.

Mia varianto: *Se ĉe lago vi ne penos, fiŝkaptile fiŝ' ne venos;* aŭ *Se barlage vi ne penos, fiŝkaptile fiŝ' ne venos.*

2 – Ищи иголку в стоге сена:

N.N. *En stako de fojno ne serĉu kudrilon, ĉar donos serĉado nenian utilon*

A.E. Pro la hasto (ĉar sendita lastminute antaŭ la dato) N.N. ne sukcesis rekontroli la gramatikecon de sia varianto. Necesus *la* aŭ *l' serĉado.* Krome *de fojno* estas gramatike ĝusta sed fajnstile persone mi dirus *da fojno.*

[1] Ferriol Macip i Bonet, *Kontakto*, 2006, 3, p. 9.

S.K. *Ne serĉu kudrilon en fojna stako, ne kaŝu alenon en mola sako*!

A.G. Estas brila ideo doni du (sinsekvajn ĉi tie) proverbojn samtempe! Rezultiĝis kaj ŝparvorta kaj rimita duproverbo. Mi sentas ke eblas ankaŭ plibonigi la duproverbon, kaj emas, sed eble tion faros kaj alsendos iu el la legantoj.

K.I. *Kudril' en fojnamaso – peniga embaraso.*

A.G. Nur la rusoj povus eble kompreni pri kio temas. Por alilingvanoj la proverbo povas diri alian eblan sencon: atentu, en la fojnamaso estas kudrilo, ĝi embarasos onin ĉe (ekz.) kuŝado, aŭ fojnotransporto, aŭ io ajn alia. Necesus nur iom alpensi por, uzante la rimparon, diri ekz.: *Kudril' en fojnamaso: ĝin serĉi – embaraso.*

Mia varianto: *Estas (Egalas al) kudrilo-ĉaso en fojn-amaso.* (Vidu en ĉi n-ro de *REGo* (en *Naciaj diraĵoj e-veste*) kiel vortumas la japanoj la saman sentencon.)

3 – Шила в мешке не утаишь:

N.N. *Saken kaŝo de aleno estas tute vana peno*.

A.G. Fakte estas klare; krome, anstataŭ iom diskutinda (pli ĝuste ne al ĉiuj e-gramatikistoj plaĉa) *saken* eblus meti *sake.*

K.I. *En sak' alenopinto perfidas la kaŝinton.*

A.G. *Alenon sake kaŝi ne efike – ĝi montros sin trapike* (iom peza, vortoza); aŭ *Alenon sake kaŝi vanos, trapiko tion akompanos*.

4 – Что написано пером, не вырубишь топором:

N.N. *Skribo vivos kaj eternos, ĝin hakilo ne ekstermos*.

A.G. Estas sufiĉe eleganta traduko.

S.K. *Per la plumo skribita ne povas esti per toporo forhakita (likvidita).*

A.G. La traduk-varianto venis lasminute antaŭ ol forsendi la materialon. Sekve oni vidas la rezultojn de la hasto: pezeta stilo, netaŭga rimo (suf. *it-it*), ne estas klare al kio rilatas la vortoj *skribita, forhakita* (rusismo).

K.I. *Vorto skribita – hakil' senprofita.*

A.G. Estas malfacile diveni kion la rusoj volas diri.

A.G. *Skribaĵ' estas febla, sed ne forhakebla;* aŭ *Skribaĵo feblas, sed hakile ne forigeblas.*

5 – Заставь дурака богу молиться – он и лоб расшибет:

N.N. *Sur frunto de stulta asketo dum preĝo aperos vundeto*.

A.G. Ĉar veninta lastminute, la tradukaĵo montras haston, nematurecon. Mankas la ŝlosile grava ideo de devigo. Krome la vorto *vundeto* ne adekvate transdonas la sencon de la vorto *расшибет.* Ankaŭ la nocioj *stultulo* kaj *stulta asketo* ne estas la samo.

K.I. *Stultula preĝo ĝis la frunta breĉo;* aŭ *Stultulo preĝas – la frunton breĉas.*

A.G. Ioma nekoincido de la rimsilaboj *-eĝo* kaj *-eĉo*. Krome mankas la nocio de devigateco, ĉar, se temas pri la stultulo, sen devigo li ne nepre preĝus.

S.K. *Voku stultulon preĝi al Dio kaj li obeante la frunton disbatos*.

A.G. Nek rimoj nek devigateco por la stultulo.

A.G. *Devige preĝis ul' malsaĝa, frakasis kapon al bandaĝo*; aŭ *Devigu stulttulon preĝo-pompi, li nepros la frunton rompi.* (Iom longe, ie en la aero certe ekzis-

tas pli mallonga varianto).

Mi ne pretendas esti perfekta komentanto de la tradukoj. Se iu el la legantoj opinias alian pritakson, tiu povas alsendi ĝin por ke ĝi aperu en la sekva publikaĵo. Malgraŭ tio, ke nesufiĉo da partoprenantoj flustras al mi "fermi la butikon", mi esperas, ke tiu artikolo kuraĝigos aliajn al la partopreno. Ankaŭ e-klubojn.

Nun mi atendas al mia adreso viajn opiniojn pri la plej trafaj tradukoj. Eblas ankaŭ traduki kaj alsendi la unuajn kvin proverbojn surbaze de la prezentitaj supre tradukoj, iasence plibonigi ion. Bluas la revo iam eldoni e-lingve libron de rusa proverba saĝo!

Jenas la sekvaj proverboj por la traduko. La limdaton por alsendi la redakcio permesis plilongigi ĝis la 20-a de majo.

1. Муж и жена – одна сатана.
2. Хорошая "мысля" приходит "опосля".
3. Не имей сто рублей, а имей сто друзей.
4. Не рой яму другому – сам в нее попадешь.
5. Милые бранятся – только тешатся.

Evidentiĝis, ke post la junio mi devos reveni en vilaĝon kie ne estas retaliro. Mi petas iun e-spertan leganton transpreni somere la "butikon".

Anatolo Gonĉarov (Krasnojarsk)

ANKORAŬ PRI LA HISTORIO DE E-MOVADO

Observante la historion de E-movado en Soveta Unio, ni vidas kiel artifikis politike kaj socie aktivuloj dum sovetia periodo.

ГЕНЕРАЛЬНОМУ СЕКРЕТАРЮ ЦК КПСС
тов. Л.И.БРЕЖНЕВУ

Мы, коммунисты, участники слёта эсперантистов в Латвии, вынуждены просить Вашей помощи.

Эсперанто-движение в нашей стране существовало ещё при жизни В.И.Ленина, опираясь на действенную государственную помощь и поддержку прогрессивных всемирноизвестных советских авторитетов – Дзержинского, Коллонтай, Керженцева, Горького, Луначарского ...

В последние десятилетия перед созданием АСЭ периодически издавались учебники, словари, журналы, на ежегодных всесоюзных слётах советских эсперантистов подводились итоги социалистического соревнования между эсперантскими коллективами страны.

14 марта 1979 года в СССР при ССОД создана Ассоциация советских эсперантистов /АСЭ/. Её создание во многом затруднило проводившуюся общественно-полезную работу, хотя согласно Положению Ассоциация должна была усовершенствовать её.

Четвёртый год с помощью АСЭ дезорганизуется деятельность эсперантистов внутри страны. С созданием АСЭ было прекращено издание советских номеров журнала "Пацо" /"Мир"/, "Пор ла пацо" /"За мир"/, информационной периодики на эсперанто. "Информационный бюллетень" АСЭ выходит 3-4 раза в год, нерегулярно, не выполняет даже малой части своих функций.

Всё это производит невыгодное впечатление об условиях деятельности советских эсперантистов среди эсперантистов зарубежных стран.

Виновны в этом некоторые члены Президиума ССОД, АСЭ и по сути своей противник эсперанто ответственный секретарь АСЭ А.В.Берёза, который на отчётно-выборной конференции 27 марта 1982 года, где присутствовал и представитель ЦК КПСС, был забаллотирован при голосовании, но в тот же день, вопреки воле конференции, кооптирован в Президиум и в прежней должности продолжает дезорганизовывать работу.

Мы просим для улучшения работы советских эперантистов:

1. Возобновить социалистическое соревнование между эсперанто-коллективами страны.

2. Выполняя решения конференции АСЭ, приступить к изданию ежемесячного общественно-политического журнала на языке эсперанто.

Iam Aleksandr Melnikov, Tanja Kurepina kaj Boris Zozulja, aktivuloj de la Rostova E-klubo "Amikeco", diskutis pri organizo de iu E-renkontiĝo. A.Melnikov kaj B.Zozulja diris: "Ne, tio estas danĝera". – "Ha, vi estas malkuraĝuloj", – riproĉis nin Tanja. – "Malkuraĝaj homoj ne aktivas en E-movado", – kontraŭdiris Aleksandro.

En aŭgusto de 1982 dum renkontiĝo en Latvio laŭ iniciato de Dmitrij Cibulevskij komunistoj – partoprenantoj de la renkontiĝo kolektiĝis por pritrakti leteron al la Ĝenerala Sekretario de Centra Komitato de KPSU (Komunista partio de Soveta Unio) L.I.Breĵnev. Ilin maltrankviligis la malbona funkciado de ASE kaj la brems-agado flanke de la respondeca sekretario de ASE A.V.Berjoza. Post longaj diskutoj, serĉoj kaj elektoj de ĝustaj ne tro ofendaj vortoj

estis verkita la teksto. Ni, dek komunistoj, kiuj verkis tiun leteron, bone komprenis, ke nia afero ne estas sendanĝera. Du ĉeestintaj kamaradoj (parto de subskribintoj ne partoprenis la renkontiĝon kaj subskribis la leteron ricevinte sian ekzempleron perpoŝte) ne subskribis. Samideano P.Aitai (el Estonio) diris, ke subskribi la akuzantan leteron li ne volas, ĉar la registaro de Estonio ne bremsas E-movadon en la respubliko. Samideano A.Natinj (ŝipestro, Kamĉatko) ne emis subskribi, ĉar ne tre bone scias pri la situacio pro longtempa foresto dum navigadoj tra maroj kaj oceanoj. Post ioma pripenso li konsentis subskribi la leteron. Pro tio lia familia nomo estas ne tajpita, sed mane enskribita.

Post du monatoj mi ricevis de D.Cibulevskij (estrarano de ASE) la respondon al nia letero, kaj ankoraŭ post kelkaj monatoj s-ro Berjoza estis demisiigita de la posteno (li forveturis al iu hispanlingva lando ofici ĉe la ambasado). La postenon de la ASE-sekretario okupis s-ino Ŝanina. Tamen tio estas alia periodo, alia historio.

- 2 -

3. Организовать радиостанцию для выпуска в эфир радиопередач на языке эсперанто для зарубежных эсперантистов.

4. Издавать еженедельно информационный листок о деятельности советских эсперантистов.

5. Ежегодно организовывать традиционные летние слёты советских эсперантистов.

6. Наладить издание учебно-методической и художественной литературы на языке эсперанто.

Мы просим Вашего вмешательства и помощи в решении поставленных вопросов. Мы считаем, что пора положить конец безответственности, которая не может не вредить осуществлению задач эсперанто-движения – борьбы за мир, пропаганды советского образа жизни за рубежом, интернационального воспитания молодёжи.

Цибулевский Д.М. Цыбулевский
310024,г.Харьков,ул.Чайковского
д.25, кв. II

Возная Н.В.
343220,г.Славянск,ул.Маршала
Василевского,д.10,кв.47

Борисов Л.Н.
140402,г.Коломна,ул.Дзержинского
д.21,кв.27

Титаев А.В.
690078,г.Владивосток,ул.Пушкинская,д.23,кв. II

Митрофанов Г.С. Митрофанов
347908,г.Таганрог,Нижняя линия,
д.25,кв.23

Вайнблат С.И. Вайнблат
270007,г.Одесса,ул.Куйбышева
д.18,кв.2

15.08.82 г.

Крылов Э.К. Крылов
281900,г.Каменец-Подольск
ул.Московская 41,кв.12

Шило Г.М.
343220,г.Славянск,пер.Батюка
д.10,кв.24

Зозуля Б.А. Зозуля
344101,г.Ростов-на-Дону,пр.
Стачки,д.16,кв.52

Айтай П.А.
г.Пярну,Эст.ССР,ЛИУ

Медыньш А.В.
226002,г.Рига,ул.Смильгя,
д.34,кв.5

Ленская Г.В.
143400,г.Красногорск,Московская обл.,ул.Ленина,47/3/235

Натинь А. И.
г. Петропавловск-Камчатский, бульвар Рыбацкой Славы, д. 3, кв. 10

Kompreneble, ĉio en Sovetunio estis sub strikta kontrolo de KPSU kaj KŜS. Kiam en 1983 jaro mi decidis oficialigi la Rostovan E-klubon “Amikeco” kaj komencis atakadi (pli ĝuste – tedi) la provincan komitaton de komsomolo, oni perdinte paciencon mallaŭte diris: “Boris Aleksejeviĉ, nu vi ja scias, ke en nia lando ĉion aprobas la partio”. – “Do, kion mi devas fari?” – “Turnu vin al la obkomo de la Partio (provinca komitato de KPSU) al kamarado M., ĉefo de la fako pri eksteraj rilatoj, jen estas lia telefonnumero”. Sekvan tagon mi telefonis al M. kaj estis akceptita, klarigis pri Esperanto kaj E-movado. Post unu monato mi ricevis permeson ne nur oficialigi la klubon, sed eĉ fondi la Rostovan urban filion de ASE (kompreneble laŭ permeso de ASE-estraro). Post duonjara prepara laboro fare de M.Aderkass, J.Belonenko, T.Kurepina, A.Melnikov, M.Ŝĉerbinin, B.Zozulja k.a. en 1984 aperis la Rostova urba filio de ASE.

Boris Zozulja (Rostov-na-Donu)

NACIAJ DIRAĴOJ E-VESTE

parto 7 [1]

I R A N O

Ĉu eblis pli **densa ĝuo** ol alglui siajn manojn, sendispone, al la mamoj de l' patrino kaj elfluigi lakton...

S.N.Mozaffari, tr., Fonto, 101 (majo 1989), p. 26

I R L A N D O

En irlanda haveno, kiam doganisto devigis iun turiston malfermi sian valizon, elfalis kadavro de cigno, alia leĝe protektata specio. Komentis irlanda ĵurnalo: "Tiuj turistoj estas **bonvenaj kiel absceso sur la postaĵo".**

GMA, or., Monato, 1993, 3, p. 13

I S L A N D O

Jen frapego! **Elvoĉis Bjarni**

Baldur Ragnarsson, tr., "Islandaj pravoĉoj", Eldona Societo Esperanto, Malmö, 1964, p. 67

Iu komentis pri tio: Tiajn vortojn vi maldiru prefere ol elbuŝigu, kaj ŝajnas **kvazaŭ pritiris viajn langojn la troloj.**

Baldur Ragnarsson, tr., "Islandaj pravoĉoj", Eldona Societo Esperanto, Malmö, 1964, p. 63

I S R A E L O

Aŭdu, amiko! – mi diris al li. Ĉu vi volas **ekscii ĉion, starante sur unu kruro**? Sufiĉas ankoraŭ tempo por konatiĝi unu kun la alia. Ni, ja havas longan vojaĝon antaŭ ni.

Ota Ginz, tr., Norda Prismo, 1963, 4, p. 37

... ŝercas kun li kaj diras ĉiam, ke li povas sin senti en lia loĝejo kiel hejme, sed kiel konate, **la sentoj ne alvenas laŭ invito**. Kaj en tiuj ĉi tagoj komencas evolui lia unua granda senespera amo.

Ota Ginz, tr., Reuven Kritz, "Freŝa mateno", eld. "Pura" Israelo. 1967, p. 68

Rafi, leviĝu fine! Rafi!!! Tiu knabo **dormas kiel sako.** Rafi ĉu vi aŭdis?

Ota Ginz, tr., Reuven Kritz, "Freŝa mateno", eld. "Pura" Israelo. 1967, p. 78

Ofra estas konsternita. **Ŝia rigardo pendas sur Rafi**, sed ŝi ne trovas sur lia vizaĝo ian signon de moko.

Ota Ginz, tr., Reuven Kritz, "Freŝa mateno", eld. "Pura" Israelo. 1967, p. 218

Hoj, popolo similanta azenon, liberigu la vojon! Ĉu vi ne vidas, kiu ĉi tie veturas? Amerika kapitalisto, kompaniano de Morgan! **Vento blovu en la larĝan pantalonon de via prapatro,** Iŝmael!

Ota Ginz, tr., Norda Prismo, 1970, 1, p. 37

---

[1] La antaŭaj partoj aperis en REGo №№ 2 (51) – 6 (55), 2009; 1 (56), 2010.

Kaj due, vi ja memoras, kio estas skribita en Kanto de Kantoj. **"Ĉar la amo estas forta kiel la morto, la ĵaluzo estas nefleksebla kiel Ŝeol."**
Ota Ginz, tr., Norda Prismo, 1970, 1, p. 39

I T A L I O

Tiun taskon nun alfrontos la Komisiono pri Landa agado de UEA, por ke la du flankoj, oficialuloj kaj esperantistoj, iam renkontiĝu kaj **ekrulu la ŝtonon de Esperanto** en tiuj landoj.
Renato Corsetti, or., Esperanto, 1983, 11, p. 183

Se vi scius, komisaro... De Angelis **tranĉis al ŝi la vorton**: – Jes, jes, mi imagas: grandaj bienoj...
Corrado Tavanti, or., "Varmas en Romo", Koop. de "Literatura Foiro", Svislando, 1986, p. 22

Ĉu vi volas marŝi morti murde, **peco de merdo**, kaj lasu min trankvile vidi la filmon.
Corrado Tavanti, or., "Varmas en Romo", Koop. de "Literatura Foiro", Svislando, 1986, p. 56

Unu paŝon antaŭen signifas la diversaj fondaĵoj... preskaŭ ĉiam, tamen, la premioj de ili asignitaj (**pli bonvenaj ol piedbato al la postaĵo**, sed kutime tre modestaj) sinonimas la nerektan financadon de unu asocio...
Giorgio Silfer, or., Literatura Foiro, 127 (okt. 1990), p. 48

La l**onga vivo** de Cesare Pascarella **rajdis dum pli ol** okdek jaroj...
Carlo Minnaja, or., Literatura Foiro, 140 (dec. 1992), p. 297

Ĉe ni, en la lando de Galileja oni ne kutimas science alfronti la problemojn, objektive kontrolante hipotezojn: oni nur **emocie ŝveligas la sentaĵojn.**
Mauro La Torre , or., Esperanto, 1995, 5, p. 85

... en tiuj lastaj jaroj, kiam mi vojaĝis kun mia, nun ne plu vivanta edzo, multaj personoj kunveturantaj (tute ne konataj) aŭskultante nian parolon, **eltiris orelojn kaj okulojn**, kaj plurfoje demandis: "Pardonu, kian lingvon vi parolas?"
Antonia Bohomi Sperat, or., Eventoj, 1995, 1/dec, p. 7

Sed la demando ne estas tre grava, kaj ne tuŝas la esencon de brila verko, **legebla laŭ pli ol unu tavolo**...
Perla Martinelli, or., Literatura Foiro, 164 (dec. 1996), p. 314

Oni diras, ke "**malpuran tolaĵon oni lavas enfamilie**", tamen estas eble instrue malkaŝi, ke, ĝis nun...
Aldo de' Giorgi, or., Esperanto, 1997, 4, p. 70

Ĉi tie mi ne alfrontas la antikvan diskuton, ĉu la Akademio devas... aŭ male... (Persone **mi emas pendi laŭ la dua flanko**).
Aldo de' Giorgi, or., Esperanto, 1997, 4, p. 71

Do, kiu en nia beletra areno specialistiĝis pri teatroverkado? Provoke mi aplombus respondi: Baghy, Modest, Lagrange, Silfer, M.Gill, Boulton... Pardonu la italisman idiotaĵon: **Ni ne ridigu la kokinojn**! Se mi vagas en mia memoro mi trafas tre

malmultaj...
Aldo de' Giorgi, or., Monato, 1998, 2, p. 29

Ni bezonas renovigitajn impulsojn por skui nian socion el la marasmo kaj la rutino, kiuj **oksidas** la dinamikan **pensmanieron** de nia epoko.
Antonio Marco Botrella, or., La Gazeto, 91 (dec. 2000), p. 28

... nia jam mita Bulgara E-Teatro, sub gvido de nia **neoksidebla** Belka Beleva
Aldo de' Giorgi, or., Monato, 1998, 2, p. 19

Nun komenciĝas nova fazo, kiu verŝajne estos karakterizata de studejoj **ekzistantaj jure kaj nure**, kiel oni ŝercas en AIS, tio estas studejoj, kiuj ekzistas konkrete en la kadro de aliaj universitatoj.
Renato Corsetti, or., Esperanto, 2002, 1

Ne estas rilato de kaŭzo kaj rezulto inter la progreso de la Pakto kaj regreso de la tradicia movado. Sed ĝi estas inter la sukceso de la Civito kaj la trista sorto de kelkaj el tiuj, kiuj **orkestris kalumnian kampanjon** kontraŭ ĝi.
Giorgio Silfer, or., Heroldo de Esperanto, 2002, 3, p. 1

Mia kritiko al la RP kaj al la Esperanto-Radikala Asocio (ERA) estas, ke oni "**amase fritas aeron**" (itala esprimo, kiu signifas paroladi sensubstance) kaj...
Sabira Stahlberg, tr., tejo tutmonde, 3(57)

J A P A N I O

Preface. *Ĉe eklegi la unuan japanan e-libron mi baldaŭ komprenis, ke el ĉiuj mikontaktitaj pere de e-o etnoj ĉe la japanoj estas la plej malsama ol ĉe la rusoj pensmaniero. Pro tio mi notis ĉion kion mi dirus alia per la rus-esperanta gramatiko. Ekz. (pli sube vi trovos tiun citaĵon kun la referenco) la japanoj diras: "Montvilaĝo jam estis* ***preta kontraŭ la alvenonta vintro****". Sed ni, la rusoj dirus: "... estis preta por (al) la alvenanta vintro". Kaj neniam ni uzus "kontraŭ". La tradukisto de la citaĵo estas tro renoma esp-isto por temi pri lingva eraro. Simple la japanoj tiel perceptas la mondon, por ili la vintro estas pli granda plago ol por la rusoj pli kutimaj al frostoj. Tial uziĝas preskaŭ batala vorto "kontraŭ". Vi trovos ĉi tie plurajn aliajn similajn rus-japanajn malkoincidojn. Mi esperas ke la legantoj trovos per tiuj citaĵoj kondensiĝon de vere japana pensmaniero kaj riĉiĝos scii multon novan kaj utilan.*

Kiam li **elkovis sian planon ĝis tio**, li unuafoje sentis ke li **venis sub la lumon**.
Miyamoto Masao, tr., Belarto, 1961, aŭtuno, p. 43

Kisuke suferis serĉante vivrimedon en la socio. Kaj se li nur ĝin trovis, li laboregis sen penevito kaj **kontentiĝis jam per tio, ke li apenaŭ povis "ameli al si la buŝon"**.
Teruo Mikami, tr., Mori Oogai, "Rakontoj de Oogai", Japana E-Instituto, Tokio, 1962, p. 10

Suburo rigardadis kompare la du vizaĝojn kaj **tenis silenton** dum kelka tempo.
Teruo Mikami, tr., Mori Oogai, "Rakontoj de Oogai", Japana E-Instituto, Tokio, 1962, p. 31

Mi sentis **solecon**, kvazaŭ **mi estus ensorbata en la ĉielon**.
Teruo Mikami, tr., Mori Oogai, "Rakontoj de Oogai", Japana E-Instituto, Tokio, 1962, p. 15.

Kiam Simio kun granda ĝojo surgrimpis arbon por ĝui panoramon de sur ĝi, tuj ekglitis kaj "**eĉ Simio falis de sur la arbo**", kiel ja diras la proverbo.
tr., "Japanaj malnovaj rakontoj", eld. Amo-Akademio, Japanio, 1965, p. 8

El "Japana Literaturo", 1965, Tokio:

En tiu tempo feŭdismaj elementoj ankoraŭ daŭris sian laboron, prenante al si temon el la eŭropigita socio, sed iliaj esprimo kaj sentimento kompreneble restis nenio alia ol tiu de "**simio vestita eŭropmaniere**". *p. 2*

Li **eltrinkis per unu tiro** brandon... "Mi dezirus **kote ebriiĝi** kaj ĉion frakasi!" – li kriegis... *p. 46*

Ion elbuŝiginte per unu-du vortoj, apenaŭ la virino eliras al la koridoro, aŭdiĝas sonoj de vangofrapoj, sed tuj poste ekster la ĉambro **ekregas silento malagrabla kaj tiel soleca kiel kloaka akvo**. *p. 50*

Mi rigardis malsupren el la fenestro: bela valo profundis trans la atingo de l' okuloj. Mi **fariĝis anserhaŭta** kaj tremis kun dentoklakoj... mi diris, ke mi sentas malvarmon... *p. 64*

"Tiu sinjoro diris, ke li volas kunvojaĝi vin". "Ha bone, ja tre agrable! Respondis ŝi senĝene". "**Sur la sama vojo kun la sama ĝojo**". *p. 68*

Morgaŭ **ni ekiros, eĉ se pluvos lancoj**. Postmorgaŭ estos la kvardeknaŭa tago post morto de la bebo... *p. 74*

... sed kiam via patro komencis malŝpari en diboĉado, ĉio **pereis kvazaŭ oni elmetus ilin sur bambufoliojn de festo kaj svingus**. *p. 96*

Kuroemon sulkigis siajn brovojn kaj poste diris: "**La granda rado sin turnas tro malrapide**". *p. 130*

... se tiel diri, serĉi kanajlon sen domicilo tra la tuta lando, **similas serĉi unu grenon en granda riz-stoplejo. Neniu estis certa de kia pajlsako ili komencu tuŝi**... *p. 135*

Ŝia **hararo** malzorge kunligita senzorge **distaŭziĝis** jam delonge **fremde al kombilo**.
Miyamoto Masao, tr., Ihara Saikaku, "Kvin virinoj de amoro", eld. "Pirato", Oosaka, 1966, p. 63

Montvilaĝo jam estis **preta kontraŭ la alvenonta vintro**.
Miyamoto Masao, tr., Ihara Saikaku, Kvin virinoj de amoro, eld. "Pirato", Oosaka, 1966, p. 115

Miyamoto Masao, "Naskitaj sur la ruino Okinava", 1976, Japanio (or.):

... kaj preskaŭ ĉiu **prenis** du-tritagan "**profundan dormon de ŝarko**", laŭ la japana esprimo. *p. 29*

En la sama momento oni disbatis lin frakase, Hamada sentis grandan kontenton ĉe tiu bato; **la agrablo kaj kontento transiris de la pugno al la kapo**. *p. 56*

Li tamen nenion diris al siaj samtendanoj, ĉar li vidis, ke iliaj **oreloj ne havas spacon por aŭskulti** tiajn malbonajn vortojn. *p. 60*

Sed tamen la situacio klare postulas, ke **oni devis iel fliki la aferon**. *p. 107*

Finfine la korvego **eksplodis el la pacienco**. Li svinge malfermis la flugilojn kaj kriis...
Konisi Gaku, tr., Miyazawa Kenzi, "La Ĝemelaj Steloj", Japana E-Instituto, Tokio, 1984, p. 8

Kaj mi ricevis la pagon, sed **kion la dekstra mano ricevis, tion la maldekstra jam tuj devis transigi en alies manon**.
Konisi Gaku, tr., Miyazawa Kenzi, "La Ĝemelaj Steloj", Japana E-Instituto, Tokio, 1984, p. 9

Por fari tion la nova juna reĝo estis tro okupita de la **brovbrulige urĝa problemo** transloki la regnon.
Miyamoto Masao, tr., Loulan, Japana E-Instituto, Tokio, 1984, p. 24

Se ni akiros Guizi-n en nian manon, en la regiono jam restos nur unu el cent, kiu ankoraŭ ne volus **obei** Lian Volon **kvazaŭ kun la koro de lupo**.
Miyamoto Masao, tr., Loulan, Japana E-Instituto,Tokio, 1984, p. 71

"Postmilita Japana Antologio", *Osaka, 1988 (tr.):*

"Ĉu vi volas preni de mi la palton?" mi kriis, fiksante la kapon ŝanceliĝantan. Mi intencis krii, sed **lamis la lango pro ebrio**. *p. 22 (tr. Sakamoto Sydzi*)

Lia korpo eligis ĉe ĉiu moviĝo ian humide akran odoron de ledo kaj sentigis la ekziston de **muskoloj trempitaj en teda animo**... *p. 37 (tr. Morita Akira)*

Sed li neniel reagis, restis **pasiva kiel kastrita ĉevalo**. *p. 47 (tr. Morita Akira)*

... **knabino en la aĝo de petolemo**... *p. 49 (tr. Konisi Gaku)*

Ĉe tiu penso mi **saltlevis min** sur la lito kiel la risorto de muskaptilo, **tiel ke mi preskaŭ forlasis la kapon sur la kapkuseno**. *p. 145 (tr. Konisi Gaku)*

La frapoj kreskis eĉ pli fortaj, kaj mi flaris ian tumultan atmosferon. "Kiu?" ĉi-foje mi **volis voĉigi la vorton, sed la voĉo ŝajnis eliri el la oreloj anstataŭ el la buŝo**. *p. 146 (tr. Konisi Gaku)*

"Via unueco min defendos, kaj samtempe defendos ankaŭ vin mem. Anstataŭigu la stultan kaj sensencan plimulton per la vera plimulto!" **Restis problemo, kiu pendigos la sonorilon sur la**... *[evidente temas pri "sur la katon" – rim. de AG], p. 170 (tr. Morita Akira)*

Siatempe en la urbo troviĝis viroj diboĉemaj kaj kontraŭleĝaj, **elŝoviĝintaj el la feŭdismo**. Ili sin vestis per pompaj sed nenormalaj kaj liberaj kostumoj.
Maeda Ŝigeki, or., Oomoto, 1992, p. 49

Kiam mi piediris surstrate en Pusan, post la vizito al tombejo de Uno-Militistoj,

kun la ĉiĉeronino **ambaŭ kvazaŭ ŝultro**, ŝi surprize alparolis al mi korea-lingve.
Sakashita Masaaki, or., La Espero el Koreio, 1992, 4, p. 18

"Vi plukas florojn". Ĉe mia respondo ŝi **ridis en mallaŭta voĉo**, kaj diris...
Ueyama Masao, tr., Riveroj, 1993, 1, p. 16

Japanio kaj Koreio estas **tiel proksimaj najbaroj kiel inter dentoj kaj lipoj**...
Nisio Tutomu, or., Riveroj, 1993, 1, p. 25

Ĉu lingvo Esperanto mem povus havi ian nature elfontantan karakteron aŭ kulturon nur propra al ĝi mem, malsama al aliaj naciaj lingvoj? Jes. Sed kiel? Nur per **stako de niaj klopodoj** en tiu kampo. *[Ruso dirus "amaso da niaj klopodoj"; jena ekskurso en la vortarojn. PIV:* ***stako*** *1. Alta amaso de grenpajlo, kunrastita fojno, garboj, dehakitaj ŝtipoj, ktp. 2. Amaso da samformaj objektoj, metitaj unu sur aliaj (stako da libroj, da teleroj). E-rusaj vortaroj: stako – копна, amaso – куча. – rim. de AG]*
Nisio Tutomu, or., Riveroj, 1993, 1, p. 28

Kaj **okazis tiel kaj tiel***,* ĝis la infano fariĝis la filino de la doktoro.
Hans Jasik, tr., Riveroj, 1994, 4, p. 22

En la biblioteko mi **parolis pli balbute ol flue***,* ĉar al mi mankas parola praktikado.
Mine Yositaka, or., Riveroj, 1994, 6, p. 40

Tiam vi donis amikajn konsilojn al mi pri maniero, kiel **memhardi la kapablon**...
Mine Yositaka, or., Riveroj, 1994, 6. p. 40

... de 60 jaroj ĝi daŭre **nestis en la cerbo** de mi, 81 jara profundaĝulo...
Mitusi Kiyosi, or., Riveroj, 1995,10, p. 9

Krak', krak', kun krakoj de la getaoj li kuris ascende sur la ŝtuparo. Mi lante post-sekvis lin **kun strange kristala humoro**. Ekstere, la rivera vento refreŝige blovis miajn vangojn.
Ueyama Masao, tr., Riveroj, 1997, 15, p. 38

Ĉu Naozi sentis ian respondon pri mia eksedziniĝo? Li diris, mi mortigos min, kaj **ploradis tiel laŭte, kvazaŭ lia vizaĝo putrus**.
Ueyama Masao, tr., Riveroj, 1997, 15, p. 40

Estas devige, ke la knaboj provu saltrajdi sur la **aleofinan** akutan deklivon pli ol 2-metrojn altan.
Oota Yukito, or., Riveroj, 1997, 16, p. 35.

Vi estis en la plej alta kaj valora **pozicio, kiun neniu povas gajni eĉ kiel de-zirante**.
Bam Buo (Hukui), tr., Riveroj, 1998, 22, p. 10

Mi ankoraŭ pacienciĝis, dum mia patro vivis. **Se sinjoro ne estas sinjoro, vasalo ne estas vasalo**. Sekve imperiestro Wuwang en Zhon-dinastio pereigis tiranon...
Bam Buo (Hukui), tr., Riveroj, 1998, 22, p. 12

Sinzei, malbenita de la eksmikado **kontraŭstaris al** Huziware... **deziri** altajn pos-tenojn kaj rangon... *[La rusoj e-dirus "dezirante altajn" – rim. de AG]*

Bam Buo (Hukui), tr., Riveroj, 1998, 22, p. 14

En la sekvanta mateno, mi trovis lin dormantan sur la planko. Mi **tenis malfortan kapdoloron** kaj la ankoraŭ daŭrantan koleron. Ĝis nun neniu viro prtitraktis min tiel.
Hans Jasik, or., Riveroj, 1998, 22, p. 31

Per atenta rigardo mi klare legis... sed la interno restis obskura. Kion fari, mi denove **ŝtoniĝis en starado***,* sed poste algluis min al la enireja pordo...
Ueyama Masao, or., Riveroj, 1998, 22, p. 39

Poste mi aŭdis, ke la afero ĉagrenis ankaŭ lin. Oni diras, ke **en la amorafero kaŭzita al edzino aŭ edzo, perfidanto pli forte brulas**.
Hans Jasik, or., Riveroj, 1999, 25, p. 29

... diris simple per voĉo dormema. "**Vi volas, ke ni estu solaj, ĉu trafite?**"
Ueyama Masao, tr., Riveroj, 1999, 25, p. 38

En la batalkampo mi sopiris, sonĝis tiun inon, vekiĝis kaj **ploris tiom da fojoj, kiom mi ne memoras**.
Ueyama Masao, or., Riveroj, 1999, 26, p. 59

Mi celis nur plenumi mian aventuron de la amo. Kaj nun, kiam mia volo atingis la celon, **mia brusto kvietas, kiel marĉo en arbaro**.
Ueyama Masao, *tr., Riveroj, 1999, 26, p. 68*

Jes, la **frazoj marŝas** vigle kaj ampasie, rakontante la vivon de Janusz Korczak kaj tiujn de liaj ŝatataj infanoj kaj kolegoj unu post alia senhalte, **glite inter si,** tio nepre devigas vin pensi ion de eposprozo.
or., La Voĉo, 2000, 7, p. 2

Mensogi tiel ke la muroj krakas.
tr., La Voĉo, 2000, 7, p. 4

Onidire li instruis poste, dum kelka tempo, en Keio, sed nun li **ŝajne estis** denove hejme en USA.
Morita Akira, tr., La Gazeto, 91 (dec. 2000), p. 5

Ĉar koncerne la "practical English-on" mi fakte neniel progresis, kvankam mi **aŭdadis** dum du jaroj la nacian idiomon de angloj **elfali tra la ruĝaj kaj stretaj lipoj** de la olda Miss...
Morita Akira, tr., La Gazeto, 91 (dec. 2000), p. 5

Oriente de Ijajama troviĝas bela monto nomata Turugi (1955 metrojn super la marnivelo). Tie **retas ankaŭ legendoj.** Unu estas, ke iu imperiestro...
Hagita Harugo, or., Kontakto, 2000, 4, p. 7

Sur la rivero Sumida estis nube. Li rigardadis la ĉerizujojn de Mukoĵima el fenestro de veturanta vaporŝipo. La **ĉerizarboj**, plenaj de floroj, **estis** en lia okulo **melankoliaj kiel vico da ĉifonoj**.
tr., Fonto, 242 (feb. 2001), p. 14

elnotis Anatolo Gonĉarov (Krasnojarsk)

Bulteno de REU

UEA RETENIS LA MEMBRONOMBRON EN 2009

En la jaro 2009 Universala Esperanto-Asocio havis 5713 individuajn membrojn (IM), dum en 2008 ilia nombro estis 5702. La pluso de 11 signifas, ke pasintjare la ofta "kongresa efiko" apenaŭ influis la totalan nombron, kio ne mirigas, ĉar la UK-oj en 2008 kaj 2009 estis praktike same grandaj (respektive 1860 kaj 1845 aliĝintoj). La gastiganto en 2008, Nederlando, pli-malpli konservis la membraron. En la gastiganta lando de 2009, Pollando, la nombro pli ol duobliĝis. La polan kreskon kontraŭpezis malkresko en kelkaj najbaraj landoj, kiujn Bjalistoko ial ne altiris tiom kiom la pli multekosta Roterdamo. La plej granda falo estis en Rusio.

Ankaŭ en 2009 plej multe da individuaj membroj estis en Francio (611; +28), dum Germanio estis la dua (539; +5), tiel ke 20,1% de la membroj loĝis en tiuj du landoj. Sekvis Japanio (402; ±0), Brazilo (381; +44), Usono (302; –12), Nederlando (248; –6), Pollando (245; +125), Italio (195; –13), Rusio (165; –44), Belgio (155, –4), Britio (146; –7), Svedio (141; –13), Hispanio (138; –9), Finnlando (131; –5), Ĉinio (115; –12), Ĉeĥio (101; +19), Hungario (98; –15), Danio (97; ±0), Svislando (86; +1), Kanado (72; –3) kaj Israelo (65; –1).

La nombro de aligitaj membroj (AM), t.e. tiuj membroj de la landaj asocioj de UEA, kiuj ne estas IM de UEA, kreskis al 12605 (+113). Plej multe da aligitaj membroj estis en Hungario 1570 (+222), Ĉinio 1051 (±0), Japanio 948 (+271), Germanio 806 (-26), Italio 741 (-36), Pollando 700 (+200), Usono 504 (+163), Belgio 443 (-37), Francio 418 (-135), Britio 350 (-15), Svedio 320 (+25), Kroatio 295 (+2), Korea Resp. 219 (+33), Nederlando 219 (+7), Brazilo 204 (-114) kaj Finnlando 203 (+1).

La tuta membraro de UEA, t.e. aligitaj kaj individuaj membroj kune, nombris 18318 (+124). En la statistiko de ĉiuj membroj en 2009 suverene regis Hungario (1668; +207), sekvata de Japanio (1350; +271), Germanio (1345; –21), Ĉinio (1166; –14) kaj Francio (1029; –107). La nombro de landoj kun membroj de UEA kreskis de 121 al 124.

436 IM estis malpli ol 30-jaraj kaj sekve ili samtempe estis IM de TEJO. Kompare kun la antaŭa jaro temis pri malkresko je 32. El ĉiuj IM junaj estis 7,6%. (Dek jarojn pli frue, en 1999, la proporcio estis 9,7%.) El ĉiuj AM, junaj estis 1905 (-21). La junaj IM kaj AM sume nombris 2341. En 2008 tiu nombro estis 2394, tiel ke la malkresko de la tuta TEJO-membraro estis 53.

La revuo *Esperanto* havis 3765 pagitajn abonojn (-95) kaj la junulara revuo *Kontakto* 735 (-110).

Laŭlanda membrostatistiko de UEA aperas en la aprila numero de *Esperanto*.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

VIZITO AL LA CENTRA OFICEJO EN 1990

En 1990 la konata pola esperantisto Joachim Werdin vizitis la Centran Oficejon en Roterdamo kaj faris historie valoran filmeton, kiu nun estas spektebla en la Reta Kinejo de UEA: <www.ipernity.com/doc/97850/7625761>. Krom la diferenco antaŭ kaj post la renovigo de la domo de UEA, oni vidas intervjuetojn kun 5 el la tiamaj 12 oficistoj: Simo Milojević (Ĝenerala Direktoro), Marvin Stanley (kontisto), Mark Fettes (redaktoro), Roy McCoy (prespretigisto) kaj Rob Moerbeek (ekspedisto), kaj kun la volontulo Christopher Gledhill. El ili plu laboras kiel oficisto Roy McCoy, dum la emeritiĝinta Rob Moerbeek ankoraŭ helpas volontule kiel provleganto kaj bibliotekisto.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

VOĈDONADO KOMENCIĜIS EN UEA

Per la dissendo de balotiloj al ĉ. 4500 membroj, kiuj jam kotizis por 2010, komenciĝis la elektado de Komitatanoj B, kiuj reprezentos la individuajn membrojn en la Komitato de UEA dum la trijara periodo 2010-2013. Ĉiu membro rajtas voĉdoni por 6 el 13 kandidatoj, kies sinprezentoj akompanas la balotilon. Por partopreni en la voĉdonado, necesos resendi la balotilon tiel, ke ĝi atingu la Centran Oficejon plej laste la 31-an de majo.

La kandidatoj estas Marija Belošević (Kroatio), Paulo Branco (Belgio), Tomasz Chmielik (Pollando), Petr Chrdle (Ĉeĥio), Probal Dasgupta (Hinda Unio), Johan Derks (Nederlando), Mark Fettes (Kanado), Jukka Pietiläinen (Finnlando), Barbara Pietrzak (Pollando), Josip Pleadin (Kroatio), José Antonio Vergara (Ĉilio), Amri Wandel (Israelo) kaj Wu Guojiang (Ĉinio). Estis kandidatigita ankaŭ Lee Jung-kee (Korea Resp.), kiu tamen retiriĝis.

La granda nombro draste kontrastas kun la elektoj en 2007, kiam por sep lokoj aperis nur kvin kandidatoj kaj balotado ne necesis. Laŭ Ĝenerala Direktoro Osmo Buller, kiu pro ofico gvidas la proceduron, tio estas kuraĝiga evoluo. “Post periodo de ia apatio kaj senkonsileco membroj denove ekinteresiĝas pri la estonteco de UEA, kiu estas tiel bildodifina pri la tuta Esperanto-movado”, li konkludas. “Espereble tiu ĉi sukcesa fino de la unua etapo de la elektoprocezo plu akcelos densiĝon de la elekta etoso, kiun mi ja eksentas en la aero.” Buller karakterizas la elekton de B-komitatanoj kiel la plej grandskalan referendumon en Esperantujo. “Ĝi estas ankaŭ bonega maniero ankoraŭ pli proksimigi la membrojn al sia Asocio, precipe nun, kiam pro la multeco de kandidatoj vere temas pri elektoj en la plena senco de la vorto.”

La Centra Oficejo daŭrigos sendi balotilon ankaŭ al la malfruaj kotizontoj ĝis iom antaŭ la fino de majo. En la daŭro de la voĉdonado la CO informos de tempo al tempo pri la nombro de ricevitaj balotkovertoj, por ke interesitoj povu sekvi la evoluon de la aktiveco. Ĉar pluraj membroj rajtas resendi siajn balotilojn en sama koverto, la precizan nombron de balotiloj oni ekscios nur post la fino de la voĉdonado, kiam la kovertoj estos malfermitaj. Tial oni nepre ne enmetu en saman koverton ion ajn alian kun la balotilo, ĉar ekz. loĝmendo por la ĉi-jara UK fatale malfruiĝus. Kunsendo de balotilo k.a. korespondaĵoj en sama koverto eblas nur, se

la balotilo troviĝas en aparta koverto. Eblas transdoni balotilon ankaŭ surloke en la CO, ekz. dum la Malferma Tago la 17-an de aprilo.

En la antaŭa fojo, en 2007, balotado ne okazis, ĉar estis malpli da kandidatoj ol disponeblaj lokoj. En 2004 estis dissenditaj 5140 balotiloj, el kiuj revenis 1491, t.e. 29,0%. En 2001 voĉdonis 1887 membroj el 6010, t.e. 31,4%. Rekorda aktiveco estis en 1998, kiam voĉdonis 2328 membroj el 6920, t.e. 33,6%.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

REU-MEMBROJ POR 2010

INDIVIDUAJ MEMBROJ

Beljaeva Aleksandra (Belorusio), Bespalov Vladimir (Soĉi), Biĉkov Vladimir (Moskvo), Ĉuprakova Nina (Moskvo), Gadirova Diljara (Toboljsk), Gonĉarov Anatolij (Krasnojarsk), Gromov Viktor (Stavropola reg.), Guŝĉa Svetlana (Ukrainio), Jaĥina Alla (Krasnojarsk), Kitajkin Ivan (Mordovio), Krivoŝeev Denis (Niĵnij-Novgoroda reg.), Loskutova Tatjana (Ivanovo), Naĵmutdinova Lidija (Ĉeljabinska reg.), Osokin Aleksandr (Sankt-Peterburg), Platonova Jelena (Moskva reg.), Rjabĉun Valentina (Moskvo)

FAMILIAJ MEMBROJ

Ĥodusova Mila (Stavropola reg.), Loskutova Maja (Ivanovo), Striganova Anna (Moskvo), Ŝevĉenko Dmitrij (Moskvo)

ALIĜINTAJ KOLEKTIVOJ

Esperanto-klubo "Laro" (Soĉi) (12 membroj): *Belenjuk Galina, Derevjanko Vladimir, Grankina Nadeĵda, Grankina Polina, Lavrovskij Aleksej, Olejnikova Natalja, Poliŝĉuk Irina, Poliŝĉuk Valentina, Sergejev Sergej, Soniĉeva Larisa, Sorokina Julija, Timofejeva Lidija*

Moskva E-klubo "EK-MASI" (20 membroj): *Bebenina Jekaterina, Beljaeva Jekaterina, Derbasov Miĥail, Fjodorova Anna, Frolova Jekaterina, Griĉik Andrej, Grustnjov Kirill, Ĥaminskij Miĥail, Ĵiĵerina Jekaterina, Kozlov Igorj, Laŝin Svetozar, Legornev Aleksej, Ljubuŝina Jekaterina, Nikolajeva Natalja, Prilepskaja Ksenija, Sadikov Marat, Skrjabina Natalja, Ŝĉetinin Jurij, Ŝiŝkina Svetlana, Ŝtondina Anna*

Volgograda E-klubo "Espero" (10 membroj): *Bikova Ljudmila, Dumler Aleksej, Dumler Vera, Loskutova Nadeĵda, Miroŝniĉenko Oljga, Spicina Valentina, Ŝaligina Marija, Ŝapceva Nadeĵda, Taldikina Anastasija, Vtorova Tatjana*

Klubo "Esperanto" (Jelec) (12 membroj): *Gorjaĉiĥ Jekaterina, Jaickaja Vera, Kuleŝova Vera, Merenkova Tamara, Noskova Olesja, Romanjuk Jurij, Saljkova Galina, Ŝadrikova Aljbina, Zlobina Alla, Zuev Vladimir A., Zuev Vladimir V., Zueva Nina*

Tiĥvina Esperanto-klubo (11 membroj): *Baraŝkov Vasilij, Belova Tatjana, Kaĉalova Zoja, Koroteckij Aleksandr, Krejson Inga, Rajskaja Natalja, Ŝmonina*

Nina, Tiĥomirova Oljga, Vlasova Darja, Vlasova Vera, Zdrogova Nadeĵda

DANKON al: **Ivan Kitajkin** pro farita donaco al kaso de REU kaj **Mikaelo Bronŝtejn** pro malavara kotizo al la Kongresa Fondaĵo.

Uljanovska E-klubo (23 membroj): *Abramov Sergej, Aleksejeva Galina, Aljoŝina Jekaterina, Bikov Aleksandr, Ĉumakov Dmitrij, Ĵuravljova Jekaterina, Kaĉalov Ivan, Karceva Margarita, Karceva Marija, Kondratjeva Ljubovj, Kuĉatova Eljmira, Kuljbakova Ljudmila, Kuzjmina Tatjana, Muĥina Jevgenija, Paveljev Nikolaj, Semjonov Dmitrij, Sirotinina Jelena, Sirotinina Oljga, Terentjeva Oljga, Trofimov Vladislav, Tubalec Jelena, Vildanova Ajgulj, Zajceva Ljubovj*

Vladivostoka E-klubo "Pacifiko" (26 membroj): *Abisova Ljudmila, Ameljĉenko Iraida, Andrjuŝĉenko Alina, Bezdeleva Galina, Ĉernova Marina, Dubrovskaja Ljubovj, Gorbunova Violetta, Karpeta Ljubovj, Kisljakova Svetlana, Koneva Galina, Kravĉenko Nina, Kuznecova Aljbina, Maksanov Viktor, Malinovskaja Galina, Neunilova Nadeĵda, Semjonov Dmitrij, Suĥanova Galina, Ŝeĥunova Ljudmila, Ŝeremetjeva Svetlana, Ŝlepĉenko Gennadij, Timĉuk Valentina, Tiŝĉenko Margarita, Titajev Aleksandr, Udovickaja Nadeĵda, Volkova Ljudmila, Zdorik Ljudmila*

EK "Verda fajreto" (Ĉusovoj) (+2 membroj): *Ĥolmanskiĥ Ksenija, Sultangulova Sofja*

Murmanska E-klubo "Murmano" (+1 membro): *Uljanova Galina*

Plena aktuala listo de la membroj troveblas en la ttt-ejo de REU laŭ la adreso <http://reu.ru/index.php?dok=membrolisto>.

KOTIZOJ DE REU/REJM POR 2010

Membri en REU oni rajtas ekde la aĝo 18 jaroj; 14-17-jaruloj rajtas aliĝi kiel kandidatoj.

Individua kotizo – 180 rub. (por Rusio kaj aliaj landoj de KSŜ; por ceteraj landoj – 18 eŭroj), inkluzivas la membrokarton, Jarlibron/Manlibron de REU, REU-bultenon kaj aliajn informojn de REU, voĉdonrajton en REU-Konferenco, rabatojn ĉe uzo de REU-servoj kaj en aranĝoj de REU/REJM.

Dumviva kotizo – 4500 rub. (por Rusio kaj aliaj landoj de KSŜ; por ceteraj landoj – 450 eŭroj) – ĉio la sama dum la tuta vivo.

Familia kotizo – 60 rub. (la membrokarto, voĉdonrajto en REU-Konferenco, rabatoj ĉe uzo de REU-servoj kaj en aranĝoj de REU/REJM). La familiajn kotizojn rajtas pagi samadresaj parencoj de individuaj aŭ dumvivaj membroj.

Subtenkotizoj (ĉio la sama kiel por la individua kotizo): *REU-subtenanto* – duobla individua kotizo; *REJM-patrono* – duobla individua kotizo.

Kolektiva membrokotizo – 60 rub. por ĉiu aligita membro (la aliĝintaj kolektivoj pagas minimume por 5 aligitaj membroj), inkluzivas po 1 ekzemplero de REGo kaj Jarlibro/Manlibro de REU por kluboj kun 5-15 aligitaj membroj kaj por ĉiu

aldona deko de la aligitaj membroj, aliajn informojn de REU por la kolektivo; la membrokartojn, voĉdonrajtojn en REU-Konferenco, rabatojn ĉe uzo de REU-servoj kaj en aranĝoj de REU/REJM por la aligitaj membroj.

Aliĝkotizo – 300 rub., unufoje pagata de nova aliĝinta kolektivo. La jamaj aliĝintaj kolektivoj ne pagas ĝin. La nova kolektivo iĝas regiona organizaĵo de REU kaj laŭpete ricevas dokumenton pri tio. Se la organizaĵo ne pagas kotizojn por aligitaj membroj dum du sinsekvaj jaroj, ĝi estas konsiderata likvidiĝinta kaj poste devus denove aliĝi.

Rabatita abono de REGo – 300 rub. (ekster Rusio – 18 eŭroj), por ĉiuj membroj. La dumvivaj membroj, kiuj pagis sian kotizon en 2001-2003, plu ricevados REGon sen aldona pago.

Ĉiuj membroj de REU kun la aĝo malpli ol 31 jaroj aŭtomate iĝas membroj de la junulara sekcio REJM (Rusia Esperantista Junulara Movado) kaj ricevas voĉdonrajtojn en REJM-voĉdonoj.

Membroj de REU iĝas aligitaj membroj de Universala Esperanto-Asocio, la malpli ol 31-jaraj – ankaŭ de TEJO.

Aliĝilojn, rublajn kotizojn kaj rabatitajn abonpagojn por REGo sendu (poŝtmandate) al: **Чертилову Михаилу Константиновичу, а/я 21, Одинцово-6, 143006 Московская область**; aŭ uzu aliajn pagmanierojn listigitajn ĉe <http://reu.ru>. La eŭraj kotizoj pagendas al la konto **reua-p** ĉe UEA.

URSON AL MIELO ONI NE TIRAS PER ORELO

Katolika kaj protestanta pastroj kaj rabeno parolas pri misiado. Rakontinte siajn misiad-aventurojn, ili decidas interkonkursi, kaj tiu, kiu sukcesos konverti urson al sia religio, estos la venkinto.

Post unu semajno la katolika pastro alvokas siajn kunkonkursantojn kaj montras al ili urson en la preĝeja korto.

– Mi eniris la arbaron kaj haltis nur kiam mi renkontis urson. Tiu ĉi aliris min grumblante, sed kiam mi recitis el la Biblio, ĝi mildiĝis; poste mi verŝis sur ĝin sanktan akvon kaj venigis ĝin hejmen por ke la paroĥanoj vidu ĝin.

Post tri pliaj tagoj la protestanta pastro alvokas la aliajn du al la preĝdomo por vidi ursegon, kiu sidas sur benko kaj aŭskultas la preĝojn.

– Ankaŭ mi serĉis la urson en la arbaro; ankaŭ la mia estis timiga en la komenco, sed mi rigardis al la ĉielo kaj komencis kanti psalmon, je kio la urso eksidis ĉe miaj piedoj. Poste ĝi akompanis min al la preĝejo kaj ekde tiam li estas ĉi tie kaj preĝas.

Post unu semajno la du pastroj estas alvokitaj al la hospitalo por viziti la rabenon. Ili eniras la hospitalon kaj trovas lin en la lito, kun la brakoj rompitaj, komplete bandaĝitan, apenaŭ spirantan. Tre malrapide li rigardas al siaj kunuloj kaj balbutas:

– Ja ĉio iris tre glate ĝis... ĝis la cirkumcido.

juda humuraĵo de Josef Shemer

Eksciu, ke...

SES-2010

Jam la tria fizika *lernu!*-renkontiĝo, Somera Esperanto-Studado (SES-2010), okazos inter la 2-a kaj la 10-a de julio 2010 en okcidentslovaka banurbo Piešťany, situanta 80 km for de la slovaka ĉefurbo Bratislava kaj 160 km for de Vieno.

La programo konsistos el kelkaj partoj: antaŭtagmeze – instruado pri Esperanto; posttagmeze – ekskursoj, prelegoj, manlaboroj, sportoj, laborgrupoj... vespere – Nacia kaj Internacia Vesperoj, koncertoj, filmospektado, diskoteko... E-instruadon gvidos spertaj Esperanto-instruistoj en 4 grupoj, laŭ la lingvonivelo.

Pri la *lernu!*-programeroj zorgos *lernu!*-teamo. Eblos ĉeesti prezenton pri <lernu.net>, pri la traduk-sistemo de la paĝaro k.s. Vi estos bonvena iam ajn demandi aŭ proponi ion ajn, rilate al la paĝaro.

La ĉi-jara renkontiĝo enhavos ankaŭ jenajn erojn:

“Flugiloj de malfacila vento” – seminario por instruemuloj! Ĉiujn instruemajn esperantistojn kun relative bona E-nivelo (B1-C1) ni invitas ĉeesti la porinstruistan seminarion, sub la gvido de ILEI-spertuloj. La “Flugiloj”-seminarioj okazas jam ekde la jaro 2003, enkadre de E-aranĝoj.

Ekzamenoj de UEA laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER): B1, B2, C1. Eluzu raran eblon ekzameniĝi pri via Esperanto-scio, laŭ la nova komuna eŭropa referenckadro pri lingvoj.

Seminario de TEJO “Instigi Kreemon” – tiu ĉi aktivula trejnado celos instigi freŝan pensmanieron kaj krei novajn ideojn aŭ projektojn.

Legu pliajn detalojn pri SES-2010 ĉe la ttt-ejo <http://eo.lernu.net/pri_lernu/renkontighoj/SES/index.php>.

(TEJO-aktuale)

LA STUDENTOJ DE LA TRIA AĜO FESTIS LA JUBILEON DE VASILIJ EROŜENKO

Ekde 1999 en Vladivostok ĉe la For-Orienta Ŝtata Teknika Universitato funkcias la Supera Popola Lernejo (SPL), la unua popola lernejo en Fora Oriento kaj Siberio por studentoj de la tria aĝo. Samtempe estis organizitaj lecionoj de Esperanto. La studentoj lernas Esperanton dum 7 monatoj kaj uzas ĝin en la praktiko: legas beletran literaturon, lernas kantojn kaj preparas koncertajn programojn, eldonas informajn bultenojn kaj artikolojn en la Internacia lingvo. Krome la studintoj de Esperanto partoprenas la kunsidojn de la urba klubo, renkontiĝas kun eksterlandaj gastoj kaj mem vizitas aliajn landojn. Ekzemple, okazis renkontiĝoj kun gastoj el Koreio, Japanio, Francio kaj Kanado, kaj en 2003 6 gestudentoj de SPL vizitis Internacian seminarion en Ĉinio, en 2004 2 studentinoj partoprenis kelkajn Esperanto-aranĝojn en Japanio. En 2005 grupo de SPL-finintoj partoprenis la renkontiĝon de la siberiaj kaj for-orientaj esperantistoj apud la lago Bajkal, kaj en 2008 jam



26 studentoj de SPL partoprenis la Internacian E-seminarion en ĉinia urbo Ĥarbin. La iama studentino Ljudmila Abisova nun mem instruas Esperanton.

Estonte estas planataj seminarioj pri interŝanĝo de sperto inter similaj eksterlandaj Superaj Popolaj Lernejoj, kiuj nun estas en Ĉinio, Pollando, Slovenio, Italio kaj aliaj landoj. La sukcesoj de la Esperanto-instruado kaj Esperanto-movado inter maljnunuloj estas ligitaj ankaŭ kun apliko de komputilaj teknologioj kaj Interreto, dank' al kiuj la informo pri la Supera Popola lernejo kaj ties studentoj helpas plibonigi la staton de la maljnuloj en la nuntempa socio.

La lastaj 3 monatoj estis plenaj de diversaj eventoj: en decembro ni festis la 150-jariĝon de Ludoviko Zamenhof, kaj en januaro – la 120-jariĝon de Vasilij Eroŝenko, kiu kelkfoje vizitis Vladivostokon. La 20-an de februaro en la ejo de la Societo de Esploro de Amura Regiono, kie situas la vladivostoka E-klubo "Pacifiko", okazis kunveno por la urbanoj , dediĉita al Vasilij Eroŝenko. Venis ĉirkaŭ 50 personoj. La kunveno pasis tre interese. La kunvenon aranĝis finintoj de la Supera Popola Lernejo, kiuj samtempe estas membroj de la E-klubo.

Ĉi-oktobre la Vladivostoka E-klubo "Pacifiko" festos sian 30-jariĝon. Estus interese festi tiun jubileon kun novaj kaj malnovaj amikoj.

Aleksandr Titajev (Vladivostok)

VENONTAJ RENKONTIĜOJ

June (nur 100-jare), sune, kune – Itala Esperanto-Kongreso ekde la 21-a de aŭgusto 2010 apud Venecio <http://italakongreso.esperantoitalia.it/>.

Komuna Franca kaj 87-a Germana Esperanto-Kongreso, de la 21-a ĝis 24-a majo en Kaiserslautern (Germanio). Pliajn informojn vidu ĉe:

<http://esperanto-france.org/kaiserslautern2010> (france);

<http://esperanto.de/gea/anmeldung_dek.html (germane)>.

Beneluksa E-Kongreso kun Lingva Festivalo pri regionaj lingvoj (frisa, pikarda, valona...), de la 13-a ĝis la 16-a de majo en Antverpeno (Belgio). Ĉefa indeksa paĝo pri la Kongreso de 2010 – <www.esperanto.be>.

HEJ invitas al IJS, de la 3-a ĝis la 9-a de aŭgusto, en la urbo Pécs (Hungario); <http://www.ijs.hu/?q=eo/IJS-2010>.

9-a Novjara Renkontiĝo (NR), de la 27-a de decembro ĝis la 3-a de januaro, supozeble en Saarbrücken (Germanio); <http://www.esperantoland.org/nr/>.

2-a Novjara Internacia Semajno (NIS) por junuloj kaj junaj plenkreskuloj (ĉ. 14-30-jaraj), de la 27-a de decembro ĝis la 3-a de januaro, supozeble en Saarbrücken (Germanio); <http://www.esperantoland.org/nis/>.

Senpaga E-ferio en Danio – Roskilde-Festivalo!; 27.06–05.07.2010; <http://roskilde.festoklubo.dk>.

Informoj pri pliaj renkontiĝoj haveblas en la Internacia Kalendaro: <http://www.eventoj.hu>.

(TEJO-aktuale)

FORPASIS UMBERTO BROCCATELLI

La 11-an de februaro forpasis en Romo Umberto Broccatelli, Honora Membro de UEA ekde 2006. Li naskiĝis la 5-an de marto 1931. Eklerninte la lingvon en 1947, li tuj ekaktivis movade kiel unu el la refondintoj de Bolonja Esperanto-Grupo. Li kunorganizis nacian kongreson en Bolonjo en 1952 kaj la 40-an UK-on samurbe en 1955. De 1980 ĝis 2005 li membris en la Nacia Konsilio de Itala Esperanto-Federacio kaj estis plurfoje elektita al ĝia estraro. De 1989 ĝis 2002 li redaktis la organon de IEF, *l'esperanto*. Kiel fervora pledanto por la eŭropa unuiĝo li iniciatis la aliĝon de IEF al la Itala Konsilio de la Eŭropa Movado, en kies komitato li poste reprezentis IEF. En 1999 li reaktivigis Eŭropan Esperanto-Union, kiun li prezidis, ankaŭ redaktante ĝian informilon *Eŭropa Bulteno*, de 1999 ĝis 2004, kiam li iĝis honora prezidanto de EEU. Broccatelli aŭtoris la vortarojn *Vocabolario Esperanto-Italiano* (1984) kaj *Dizionario Italiano-Esperanto, Esperanto-Italiano* (2004), kaj la lernolibron *Nuovo Corso di Esperanto* (1993). Pri lingvaj demandoj de Esperanto li verkis multajn artikolojn kaj la broŝuron *Esperanto, lingvo planebla* (1996). Li tradukis ankaŭ beletraĵojn, i.a. por *Itala antologio* (1987).

Gazetaraj Komunikoj de UEA

1450 ADRESOJ EN PASPORTA SERVO

La ĉi-jara adresaro de la plej fama servo de TEJO, Pasporta Servo (PS), enhavas 1450 gastigantojn en 91 landoj. En la antaŭa eldono (2008) estis 1225 adresoj en 90 landoj. En la PS 2010 la unuan lokon okupas Francio kun 177 gastigantoj. La dua estas Germanio kun 117. En Brazilo estas 84 gastigantoj. Aliaj landoj kun multaj adresoj estas Rusio (81), Pollando (75), Ukrainio (65), Usono (63), Hungario (53), Japanio, Nederlando, Ĉinio kaj Senegalio (po 36) kaj Irano (34).

En la 208-paĝa poŝlibro troviĝas, krom la adresoj k.a. informoj pri la gastigantoj, ankaŭ mapoj kun indikoj pri lokoj kun gastigantoj. Enestas ankaŭ reguloj kaj konsiloj pri la uzo de la servo, kaj utilaj adresoj.

La ideo pri Pasporta Servo, tiam sub la nomo Programo Pasporto, estis prezentita de la argentinano Ruben Feldman González en 1966. La unua adresaro laŭ la nuna sistemo, kun 40 gastigantoj, aperis en 1974 sub la gvido de Jeanne-Marie Cash el Francio. Ambaŭ pioniroj estas gastigantoj ankaŭ en la nuna eldono.

En 2009 Pasporta Servo fariĝis ankaŭ socia retejo <www.pasportaservo.org>, kie kaj gastoj kaj gastigantoj povas membriĝi kaj kontakti unu la alian. La retpaĝo ne anstataŭas la adreslibron sed ofertas novajn servojn, haveblajn nur per Interreto. La retpaĝo nun havas pli ol 1200 uzantojn, el kiuj ĉ. 700 estas gastigantoj.

La adresaro estas aĉetebla ĉe la Libroservo de UEA. La prezo estas 9,00 eŭroj plus afranko (plus imposto de 6% en EU). Ekde 3 ekz. oni ricevas trionan rabaton.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

NOVA RETGAZETO EN LITOVIO

Ekde oktobro 2008 Antanas Grincevičius, esperantisto el la litovia ĉefurbo Vilnius, iniciatis blogon pri interesaj kaj aktualaj eventoj en Litovio. Ankaŭ Esperanto-temoj tie ne estas fremdaj. Efektive, tiu blogo estas altnivela retgazeto pri Litovio kun la titolo "Barelo", legebla ĉe <http://barelo.blogspot.com/>. "Barelo" estas imitinda ekzemplo de praktika utiligo de Esperanto. Ŝajnas, ke ĝi estas unika en la mondo. La retgazeto estas profesie farita. Ĉiu artikolo (blogero) estas bele kaj trafe ilustrita. En la retgazeto eblas legi interesajn kaj aktualajn artikolojn pri historio, kulturo, naturo, arto, ekologio, ekonomiko, politiko, energetiko, festoj, folkloro, fotografio, lingvo, literaturo, muziko, scienco, sporto k.s. de Litovio – entute estas 51 ŝlosilvortoj, el ili 5 estas Esperanto-rilataj. Ĉiuj artikoloj estas verkitaj de la aŭtoro en bona Esperanto. Estas bona ekvilibro de diversaj temoj. Do, la retgazeto ne estas pri Esperanto, sed simile al la revuoj "Monato" aŭ "Kontakto" – pri diversaj temoj en Esperanto. Ekde la lanĉo de la retgazeto la 10-an de oktobro 2008 ĝis februaro 2010 en ĝi estas publikigitaj 84 artikoloj, el ili 12 estas ligitaj kun Esperanto. La retgazeto havas ligojn al aliaj retejoj pri fotoj, tradukado, lingvaj problemoj, diversaj TTT-ejoj, esperantistoj, literaturo, tekstoj, gazetaro, E-radioj k.s. La slogano de la retgazeto estas: "Por eldiri la opinion ne serĉu barelon sur bazara placo...". La redaktoro de "Barelo" estas <grinanta@gmail.com>.

Povilas Jegorovas (Litovio)

MUZIKAJ NOVAĴOJ

Afrika Kompilo. En 1996 *Vinilkosmo* jam kunlaboris kun afrikaj artistoj ekzilitaj en Germanio (Denizo Rock Tamba) kaj Francio (Zhou-Mack) por *Vinilkosmo-Kompil' (vol.2).* En 2007 Vinilkosmo lanĉis la projekton *Afrika Kompilo* pere de alvoko al pluraj afrikaj Esperanto-artistoj el Kongo, Togo, Madagaskaro kaj aliaj landoj; ni ricevis plurajn reagojn, sed malgraŭ la klopodoj, malmultaj povis alporti efektive eldoneblajn kontribuojn. La projekto *Afrika Kompilo* havis malfacilaĵojn pro manko de rimedoj, neekspluatebla muzikmaterialo pro kvalitmanko, kaj ankaŭ ĉar la projekto ekstartis dum la diskokrizo. Sed finfine en 2009 kun la starigo de la muzika projekto de *Konga Espero*, la kunlaboro inter *Mayoma* kaj *JoMo*, kaj titoloj de *Dido Fundu* de *Vigla Muziko*, la *Afrika Kompilo* povis finfine efektiviĝi. Tiu ĉi kompilo kunigas du albumetojn: *Kiu lingvo?* (8 titoloj) de *Konga Espero* kaj *Mayoma kun JoMo Afrikumas* (7 titoloj), kaj 3 titolojn de la bando de *Dido Fundu, Vigla Muziko*. Ili estis miksitaj, mastrigitaj kaj kompilitaj en la Studio de la Trappe/Vinilkosmo sur sama disko sub la titolo *Afrika Kompilo*, kaj eldonita de

Vinilkosmo. Tiu ĉi projekto efektiviĝis dank' al internacia solidareca interŝanĝo kaj kunlaboro inter artistoj, teknikistoj, grafikistoj, produktistoj, kaj subtenaj amikoj el Kongo, Germanio, Hispanio kaj Francio.

Samideano. Igor Wasilewski, alinome *Eterne Rima*, origine el Pollando kaj nun loĝanta en Tokio, esperantistiĝis en 2000, ĉarmita pro la beleco kaj karaktero de Esperanto. Jam partopreninte en nia *Elektronika Kompilo* per la furora *Planedo Esperanto* el lia dua klubdanca projekto titolita *Lunatiko*, *Eterne Rima* revenas al ni kun tiu ĉi nova albumo, kvintesenco de pura krunka hiphopo moderna kaj de arenbio (R&B) en Esperanto. *Samideano* estas la unua albumo en tiu ĝenro en Esperanto laŭ tre aktuala hiphopa stilo *Dirty South* (fisuda repo) fama el la sudaj ŝtatoj de Usono, kiu rapide disvastiĝas sur la tuta terglobo. La repaj tekstoj temas pri mono kaj la vivo de la riĉuloj, la rilatoj inter viroj kaj virinoj, kaj kelkaj viglaj kritikoj pri la mokuloj de Esperanto kaj pri la eternaj komencantoj! Krome en la albumo estas 15 MP3-aj duoninstrumentaj titoloj por karaokeo kaj 6 bonusaj remiksaĵoj. *Por aŭskulti fragmentojn de la diskoj aŭ rekte mendi, bonvolu viziti la ttt-ejon <http://www.vinilkosmo.com/>.*

Metala kompilo. En 1990 Vinilkosmo lanĉis sian unuan kompilprojekton, kaj de tiam la eldonejo senĉese laboris pri tuta serio de kompiloj diversstilaj: *Vinilkosmo-Kompil' (vol. 1 kaj 2), Kolekto 2000, Esperanto Subgrunde, Elektronika Kompilo, Hiphopa kompilo kaj Afrika Kompilo*, kiuj povis realiĝi dank' al la partoprena kontribuo de multaj artistoj, bandoj kaj kunlaborantoj el la tuta mondo. En 2006 Vinilkosmo lanĉis la projekton *Metala Kompilo*, sed ĝi restis dormanta dum 4 jaroj pro manko de kontribuoj kaj kvalitaj proponoj. Nuntempe la scenejo de peza roko kaj metalo notinde disvolviĝis, kaj tio kuraĝigis nin por relanĉi la projekton kun la espero finfine sukcesi. Peza metalo, mortmetalo, drasmetalo, hardkora metalo, melodia metalo, gotika metalo, simfonia metalo, ktp... ĉiuj proponoj kvalitaj kaj kantitaj en Esperanto interesas nin kaj estos pritraktitaj. Bonvolu viziti la paĝon ĉe *Myspace* <http://www.myspace.com/metalakompilo>, speciale preparitan por la okazo kaj (se vi interesiĝas) kontakti la artajn reĝisorojn de la projekto Rogener kaj Leandro per la adreso <metalakompilo@gmail.com>.

FESTO 2010 en Tuluzo. Ĉi-somere Tuluzo akceptos la faman internacian renkontiĝon "FESTO", organizatan ĉiujare de la Junulara Esperantista Franca Organizo (JEFO) kune kun EUROKKA kiel partnero por la arta programo. FESTO okazos de la 13-a ĝis la 20-a de aŭgusto 2010 en la areo de la Scienca Universitato *Paul Sabatier* kaj estos okazo ne maltrafenda por ĉiuj kiuj volas paroli kaj praktiki Esperanton kaj renkonti gejunulojn el diversaj horizontoj en festeca kaj mojosa etoso. Multaj diverslandaj partoprenantoj jam aliĝis. La kultura programo, kvankam ankoraŭ ne tute definitiva, promesas viglajn momentojn kun *Martin kaj la talpoj*, *Dolchamar*, *Kaj Tiel Plu*, *Kajto*, *La Pafklik* kaj *JoMo*. Estas antaŭviditaj ankaŭ okcitana vespero kaj diversaj aktivaĵoj, ekz. biciklaj ekskursoj laŭ la Suda Kanalo, vizitoj de la rozkolora urbo kaj regiono, kursoj de Esperanto por komencantoj, de la okcitana kaj la kataluna, kantateliero ktp... Bona kaj forta teamo

kreiĝis por la organizado per membroj de JEFO, EKC kaj EUROKKA por FESTO vigla! Antaŭ ol ne plu restos lokoj disponeblaj, eksciu pliajn detalojn kaj aliĝu ĉe <http://esperanto-jeunes.org/FESTO-2010?lang=eo>.

Dolchamar, la popa elektro-rok-bando el Finnlando, preparas sian 3-an albumon "Trajn' nenien", antaŭvidite aperonta dum printempo 2010.

Reeldono de la albumo "***Jacques Yvart kantas Georges Brassens***" kun pliaj novaj titoloj de Georges Brassens kantitaj en Esperanto de Jacques Yvart estas antaŭvidita por pasko 2011 okaze de IREM (Interasocia franca kongreso) en Sète.

Vinilkosmo

"LA VERDAJ FOLIOJ DE SOMERO"

Mi prezentas al vi mian tradukon de la fama usona kanto "The Green Leaves of Summer". Al ni, rusiaj esperantistoj, ĝi estas konata laŭ la versio de Jefim Zajdman (sub la titolo "La tempo somera"), kiu fakte estas refaraĵo de la kanto, sed ne traduko. La originala kanto "The Green Leaves of Summer" unuafoje sonis en 1960 en la fama usona kinofilmo "Alamo" de la reĝisoro John Wayn. Tiu ĉi filmo estis dediĉita al unu el la plej heroismaj paĝoj de la historio de Usono – batalo ĉe la fortikaĵo Alamo en la ŝtato Teksaso en la jaro 1836, kiam la usona garnizono, konsistinta el 187 homoj, dum 13 tagoj defendis la fortikaĵon kontraŭ la sepmila armeo de la meksika generalo Santa-Anna. La defendantoj de Alamo tiam ĉiuj pereis. La kanto "The Green Leaves of Summer" sonas ĉe la filmeroj, montrantaj kampon, plenan de tomboj kaj monumentoj al la pereintaj usonaj soldatoj. Spektinte tiun ĉi fragmenton, mi komprenis la tragikan sencon de la kanto. Tio influis mian tradukon de la kanto al Esperanto, en kiu mi strebis transdoni antaŭmortan sopiron de la usona soldato pri la feliĉa pasinteco. En 1961 la filmo "Alamo" estis prezentita por la premio "Oscar" en kelkaj nomumoj, inkluzive tiun pri "La plej bona muziko". Krome la aŭtoro de la muziko Dmitrij Tjomkin ricevis por tiu ĉi kanto alian prestiĝan premion – "Ora globuso" – por la plej bona muziko.


Dmitrij Tjomkin (1894-1979) estas granda komponisto de la usona kinoarto. Li naskiĝis en 1899 en la urbo Kremenĉug de Poltava gubernio. La profesian muzikan kleron Dmitrij ricevis en la Peterburga konservatorio. Inter liaj konatoj estis tiaj personoj kiel Sergej Prokofjev kaj Fjodor Ŝaljapin. En 1921 D.Tjomkin elmigris al Berlino, kie loĝis tiutempe lia patro, kaj en 1925 li translokiĝis al Usono, kie faris brilan karieron en Holivudo. Li verkis melodiojn kaj kantojn por 136 kinofilmoj! 22-foje liaj kreaĵoj estis nomumitaj por la premio "Oscar", 4-foje li ricevis tiun premion. Lia granda talento de melodiisto levis multajn liajn kinokantojn ĝis la nivelo de dramaj scenoj. Inter ili unu el la plej elstaraj – "The Green Leaves of Summer". La aŭtoro de la teksto estas usona poeto-lirikisto Paul Francis Webster, kiu estis same fama, kiel D.Tjomkin. Li verkis pli ol 50 originalajn kantojn, plejparte por kinofilmoj. 16 el ili estis prezentitaj por premioj en diversaj usonaj konkursoj, interalie "The Green Leaves of Summer".

Ludmila Novikova (Moskvo)

LA VERDAJ FOLIOJ DE SOMERO
Teksto de P.F.Webster   Muziko de D.Tjomkin

En tempo semada, en tempo rikolta
Min ĉiam alvokas al si patroter',
Kie pasis junjaroj, plenaj de vivoforto,
Kiel verdaj folioj en frua somer'.
    En tempo semada, en tempo rikolta
    La verdaj folioj min vokas al hejm',
    Kie pomoj aromas, en river' saltas fiŝoj
    Kaj el pina arbaro aŭdiĝas gufĝem'.
En tempo semada, en tempo rikolta
Mi amis knabinon, plej belan sur ter',
Kiu iĝis edzino, al mi naskis gefilojn
Sub la verdaj folioj en frua somer'.
    Jen tempo semada, jen tempo rikolta
    Alternas sur tero sen ajna devi'.
    Ho vi, ter' de praul oj, veas mi, ke ne eblas
    Vin ekvidi, nek vivi kaj morti ĉe vi!

traduko de L. Novikova (2010)



Dmitrij Tjomkin

Mikaelo Bronŝtejn

La urbo Goblinsk[1]

06.03.199…, sabato

– Mi ne volas ke vi foriru… – ŝi flustris, karesante lian bruston per facilaj tuŝetoj de la lipoj, glite donacante al lia haŭto mildan teneron de la mamoj, dum ŝiaj mincaj fingretoj palpetis kaj premis liajn ŝultrojn jen tikle, jen pli kaj pli forte, ĝisdolore. – Mi ne lasos vin foriri...
– Sed mi ne foriras, mia bona, – respondis li per iom laca flustro. Kun ĝua tenero li senpreme brakumis ŝin per la maldekstra brako, dum la dekstra polmo karesis ŝian taŭzitan hararon.

Fenestro en la ĉambro de ŝia ordinara unuĉambra apartamento en la lasta, naŭa etaĝo ne estis ŝirmita per kurteno, kaj la nokto libere venis al ilia lito. Ĝuste nun parto de la Lakta Vojo etendiĝis tie inter aliaj steloj. Ankaŭ en la ĉambro ĝi etendis bluetan krepuskon, kaj fingrosimilaj foliombroj de maljuna ĉefenestra palmo vivige promenis laŭ vizaĝetoj de ŝiaj ŝatataj pupoj, sidantaj sur la meza larĝa breto en ŝia libroŝranko.

– Vi ne komprenas, amata... – ŝia flustro fluis laŭ lia korpo. – Mi ne volas ke vi foriru... Mi ne volas... mi volas, ke vi restu kun mi por ĉiam... ke vi estu nur mia...

Li suspiris, kaj ŝi, evitigante lian respondon, metis montrofingron sur liajn lipojn.

---

[1] Ĉapitroj el la nova romano. Antaŭaj ĉapitroj el tiu ĉi verko estis publikigitaj en REGo №№ 3 (40), 3 (46), 5 (48), 2 (51), 5 (54). (La red.)

– Ne diru... – ŝi flustris. – Nenion vi devas diri... Mi scias ĉion... ĉion vi jam diris al mi. – En ŝia intermita flustro aŭdiĝis doloro. – Vi estas la plej bona... vi estas honesta... fidinda viro... edzo, paĉjo, sed permesu al mi iom reveti... dum vi estas kun mi...

Li formovis ŝian fingreton, proksimigis ŝian vizaĝon al la sia kaj kisis ŝiajn varmajn lipojn, malsekajn vangojn, plorantajn okulojn. La palmofingroj balanciĝis super ili, sekvante pezan movon de la pendolo en la murhorloĝo de ŝia avino.

– Vi ne devas plori, – li diris. – Mi petas vin, mia bona, ne ploru... Vi estas mia amata homo, la sola en la mondo. Kaj ni restadas kune multajn horojn, multe pli ol mi pasigas kun mia edzino. Sed ŝi ekzistas... ekzistas ankaŭ mia infano. Mi havas certajn devojn rilate al ili, same ankaŭ rilate al vi... Ĉu vi memoras – mi relegis al vi "La etan princon"... "Vi fariĝis por ĉiam respondeca por tio, kion vi malsovaĝigis".
– Sed se... – ŝi intervenis flustre, heziteme kaptinte la paŭzon. – Sed se... se mi revu, ke... ke mi naskos infanon... vian... nian infanon...

Li enrigardis ŝiajn okulojn kaj ekvidis tie sin mem. Siajn dubojn, siajn meditadojn. Kaj ŝian doloron. "Monstro mi estas, – li pensis. – Vampiro ia, suĉanta sangon de la amata homo..."

– Ĉu vi volas tion? – li demandis sen formovi la okulojn.
– Mi volas, – ŝi diris simple. – Kaj mi pretas.
– Estus feliĉo por mi, – li turnis iomete ŝian kapon kaj enflustris la vortojn en ŝian orelon. – Tiam mi havos du infanojn. Kaj ambaŭ estos miaj amataj.

Ŝi kisis lin kaj turnis sin flanken, por rigardi fenestren.

– Kia ĉielo estas hodiaŭ! – ŝi eksklamaciis per ravoplena flustro. – Bona ĉielo! Fekunda! Mi povus naski en la sekvanta januaro... Tiam mi havos dudek ses jarojn.
– Taŭgas, – li respondis. – Konvena aĝo. Estas sufiĉe da tempo ĝis tiam... Mi pensos, kion ni faru.

Li parolis certe, konvinkite, sen ajna spureto de hezito en la voĉo. Sed ŝi milde korektis lin:

– Ni pensos...
– Ja jes, – diris li. – Mi estas stulta, perdinta la kapon. Pro vi... pro la feliĉo.
– Ial mi timas, – ŝi flustris subite kaj denove turnis al li la vizaĝon por enrigardi liajn okulojn.

Li rigardis ŝin demande. Li ne komprenis.

– Ial mi timas... – ŝi ripetis. – Ne pri mi. Pri vi. Fojfoje mi aŭdas iajn strangajn parolojn.
– Mi ne komprenas vin, kara, – li kisis ŝiajn harojn. – Mi komprenas, ke okazas io, kio neniam en mia vivo okazis antaŭe. Eble la tempo iĝos eĉ pli malfacila ol nun. Sed mi estas forta. Kaj mi havas kapon. Do mi sukcesos defendi min kaj ĉiujn miajn proksimulojn.

Ŝi leviĝis de sur la lito, aliris la fenestron. En la blua krepusko ŝia korpo ŝajnis ĉirkaŭita de sorĉa blanka aŭreolo. Ŝi rigardis suben, en la korton – ĝi estis senhoma kaj silenta.

– Bone, se vi kredas tion... – ŝi diris kaj rigardis lin atente. – Sed nun iru. Estas jam la dua horo. Iom pensu pri mi, kaj mi venos vian sonĝon. Dormu bone.

La lifto ne funkciis. La ŝtuparplaceton de la naŭa etaĝo lumigis dudekkvinŭata lampeto, protektita per metala krado. Estis li, kiu instalis la kradon, antaŭe lampetoj malaperadis duontagon post ĉiu vica ŝanĝo. Febla lumo de la naŭa iom tuŝis ankaŭ la okan etaĝon, sed poste, pli sube, ĝis la unua etaĝo la ŝtuparo estis senluma kaj morna. En la kvina etaĝo videblis tri aŭ kvar inkandeskaj punktoj – homoj fumis tie, ŝajne ankaŭ drinkis – li aŭdis boteltintadon. "En ĉiu domo okazas, – pensis li, sentante ioman streĉiĝon. – Kial mi zorgu? Homoj venis ĉi tien pro la frosto. Certe, la tempo iom malfrua, aŭ kontraŭe – frua por promenoj. Ĉu estas senhejmuloj? Tamen ne – tiuj sin kaŝas nun en keletaĝoj, ĉe varmaj hejtotuboj..."

– Oĉjo! – nelaŭte raŭke elparolis unu el la fumantoj. – Donu cigaredon...

Li ne bone vidis la vizaĝojn, sed ŝajnis ke ili estis knabĉjoj – adoleskuloj. Unu – malalta dikuleto – movis sin dekstren, liberigante la vojon. Du aliaj faris paŝon malantaŭen al muro. Nur la raŭkulo, bubo magra kaj alta, restis baranta lian iron.

– Mi ne fumas, knaboj, – respondis li trankvile.
– Ne fu-umas? – nekredeme demandis la raŭkulo. Li havis dikajn lipojn; farinte per tiuj lipoj strangan maĉmovon li kraĉis flanken kaj diris: – Ĉe la plastoj oni ne fumas nun, buboj, ha?.. Nu-u, se vi ne fumas, oĉjo, do paŝetu plu... dum ni estas bonhumoraj...

Tion dirinte, la raŭkulo rikanis, refoje maĉmovis siajn dikajn lipojn kaj denove kraĉis flanken. Nehaste li paŝis malantaŭen al siaj ĉemuraj kompanoj, liberigante la vojon.

"Mi iru, – li pensis. – Sed tiu dikuleto estas danĝera. Kiam mi turnos min maldekstren, mi ne plu povos kontroli – li estos malantaŭ mia dorso..." Li paŝis sur la ŝtuparplaceton, turnis sin maldekstren kaj strabe rimarkis, ke la dikuleto tuj svinge levis la brakon, pli longan ol normala. Ian klabon la dikuleto estis kaŝinta transdorse...

Iam li fervore trejnis sin pri memdefendo, do ne estis problemo kapti la brakon kun la klabo, levinte ambaŭ manojn supren kaj iom malantaŭen. Kvankam la dikuleto estis peza, li sukcesis, klininte sin, ĵeti tiun korpon transŝultren tiel, ke la dikuleto alteriĝis sub la piedojn de la ĉemura kompanio.

– Pro kio do, knabo? – li elparolis kun peza ekspiro. – Mi ne ofendis vin ja...
– Ha! Li ne scias pro kio! – eklamentis la raŭkulo kaj faris abruptan movon per la dekstra pugno. – Batu lin, buboj!

Fera aŭ eble plumba kelkpinta kaprompilo trafis lian makzelon. La doloro estis tranĉa, bruliga sed mobiliza. Li sciis, kion li faru nun. Li kaptis la jakon de la raŭkulo, impete tiris al si kaj lasis, paŝinte flanken. La raŭkulo stumblis kontraŭ la kuŝanta dika korpo kaj falis pervizaĝe sur la cementan plankon de la placeto.

Li ekkuris suben, ne retrorigardante, nur aŭdante strangan tumulton tie en la placeto. La placeto lumiĝis – du pordoj tie malfermiĝis samtempe, eligante grumblajn virajn voĉojn kaj virinan ekjelpon: "Mili-icon! Mili-icon mi jam vokis!" Li kuris inter domoj, kun penso, ke eble ili ne persekutos lin, sed endas tamen kuri, ĉar kvar kontraŭ unu estas tro...

Post iom da tempo li malrapidigis la kuron, reakiris normalan spiron, sed trankvilo ial ne venis al li.

“Ĉe la plastoj...” – li rememoris la diraĵon de la raŭkvoĉa diklipulo. “Ĉe la plastoj... – li ripetis penseme. – Sekve ili atendis min. Ĝuste min. Kial?”
Li palpis sian ŝvelintan makzelon. Sur la fingroj restis sangospuroj. “Mi scivolas vidi min en spegulo, – li pensis. – Tamen estas bone, ke tri ripoztagoj sekvos nun. Almenaŭ iom normaliĝos la aspekto – oni ne tro ridos en la uzino...”

23.03.199…, mardo

Estas iom enua la rusa kalendaro post la Virina tago. Specialaj festotagoj mankas ĝis la Pasko, kiu ĉi-jare trafos en tiun senfestujon la dekokan de aprilo. Eĉ tio estas bonŝanco, ĉar la plej proksima ŝtata festo venos nur la unuan de majo. Komprene-ble, okazas ies naskiĝtagoj, nomtagoj, profesiaj festoj... eĥ, se la animo petegas, oni povas prifesti ion ajn, ekzemple, la datrevenon de la Pariza Komunumo. Ne gravas, ke tiu efektiviĝis iom for de nia urbeto, eĉ de la lando. Ĝi estas historia fakto, kiu definitive meritas levon de almenaŭ unu glaseto!
Tamen la rusa kalendaro en tiu periodo estas senfesta – ankaŭ tio estas fakto. Do, se oni estas ortodoksa kristano, oni preferu labori, fasti kaj preĝi dum kvardek tagoj ĝis la Pasko, aŭ, se oni estas sekularuro, – labori, spekti stultajn televidpro-gramojn dum vesperoj, semajnfine skii en arbaro, viziti publikan ŝvitbanejon kaj tamen, post tiu, levi glaseton je la perfekta sano. Multaj neĝoj kaj frostoj ankoraŭ devas pasi ĝis alveno de vera plenrajta printempo, kiam oni – kaj ortodoksuloj, kaj sekularuloj – rehavos la okupon, ordinaran por ĉiuj urbetoj de la lando. Venos la senenua sezono de ĝardenumado... sed tro longa atendo antaŭas ĝin.

Depost la oka de marto por Nina Dmitrievna Bikova, la etatestrino de “Rusoplast”, komenciĝis infere arda laborego. La direktoro devigis ŝin plentempe okupiĝi pri la privatigo. Necesis kontroli kaj ĝustigi la liston de personaro, laboranta nun en la uzino. Necesis kompili liston de personaro, emeritiĝinta dum la lasta jardeko, ĉar ankaŭ ĉiu el ili rajtis ricevi unu-du akciojn de la privatigota entrepreno. Aparta listo estis farenda por la etatanoj kun iaj meritoj – ordenumitoj, medalumitoj, premiitoj – bonŝance ne estis multe da tiuj inter la ducentsesdekpersona etatanaro. Krom tiuj farendaĵoj al ŝi estis komisiita ankaŭ enketo de la uzinanoj – pri la kvanto de ak-cioj, kiun ĉiu el ili volus akiri el la stoko distribuota interne, en la uzino. Ŝi sentis devon singarde aludi al Viktor Vasiljeviĉ, ke tian enketon malpermesas la privatiga leĝaro, sed la aludo provokis tian eksplodon de furiozo, ke ŝi ektimis. Per vortoj ne tro decaj la direktoro klarigis al ŝi, ke pri la leĝaro li spertas multe pli ol ŝi, do ŝi elektu – obei la ordonojn aŭ maldungite eksidi hejme, cedinte sian postenon al pli obeema persono.
Dum sia dudeksepjara laboro kun diversaj direktoroj de “Rusoplast” Nina Dmitrievna plurfoje aŭdis diversajn ordonojn, kaj se ŝia antaŭsento sufloris pri ia eventuala danĝero, ŝi ĉiufoje, plenumante la ordonojn, sukcesis trovi ĝustan padon, evitigantan ajnan damaĝon por ŝi mem. Ankaŭ nun Nina Dmitrievna trovis tiun. Ŝi diris, ke bezonas helpon pro abundo de papera laboro, kaj ricevis por sia dispono du subulinojn. Prave ŝi konkludis, ke, se la uzinanojn pridemandos Maŝa kaj Kira, promesitaj al ŝi de Sigaev, kaj se iu el la demanditoj plendos ekstere en la urbo, ŝi estos absolute senkulpa.

Do la kompatinda kaj mokridinda paro, vestinte vatjakojn, devis treniĝi al la metiejoj por enketo. Mokridindaj ili estis por la laboristaro ĉar tro kontraste aspektis la paro – diketa, anserpaŝa librotenistino Maŝa, kaj alta, magra ekonomikistino Kira. Sed kompatindeco ilia enestis en la bezono klarigi preskaŭ al ĉiu demandato sencon kaj esencon de la enketo kaj de la privatigo ĝenerale. Ĉar ili, verdire, mem ne bone imagis tiujn sencon kaj esencon. La afero, farata tiamaniere, montriĝis tiom daŭra, ke dum unu labortago Maŝa kaj Kira sukcesis enketi averaĝe dudek personojn, ne pli.
Hodiaŭ la paro ĝisiris la mekanik-riparan metiejon, lokiĝantan en aparta konstruaĵo ĉe la plej suda rando de la uzina teritorio. Densa bruado de tornaj, frezaj kaj boraj maŝinoj surdige sonis el la ejo magre lumigita. Des pli blindigaj en tiu duonlumo estis abundaj sparkoj de veldaparatoj, funkciantaj kelkflanke. Kira kaj Maŝa heziteme haltis, malferminte la enirpordeton de la granda movpordego poraŭta.
– Hej, kontoro, panjo via fikita! – senceremonie blekis grasmakulita ulo en malpurega kombineo. – Fermu la pordon! Ne majo estas nun!
– Vi-iro! – sopranece elkantis Maŝa. – Kie ni trovu mekanikiston Ŝu-umskij?!
– En lia ĉelo! – malafable rediris la ulo, mansvinge montris la direkton kaj forturnis sin.
– Da-ankon, vi-iro! – elkantis Maŝa, sed la ulo ne reagis.
Laŭ mallarĝa brune farbita vojeto inter maŝinaro, singarde transpaŝante iajn metalaĵojn kaj oleflaketojn, superŝutitajn per segaĵo, la paro venis kabineton de la ĉefmekanikisto – ĉambreton tri je kvar metroj, en fora angulo de la metiejo. Brika muro, apartiganta tiun angulon disde la metiejo, grave reduktis la eksteran bruon, krom tio la ekstera muro havis grandan fenestron, do la ĉambreto estis konvene lumigita.
Maksim sidis ĉe malnova kontora tablo, akaparita antaŭ du jaroj, kiam por kelkaj kontorfakoj estis aĉetita nova meblaro. Antaŭe tie ĉi staris veldita monstra kreitaĵo de liaj laboristoj. Bretaro ĉemure plenis je malpuraj paperujoj kun desegnaĵoj kaj aliaj dokumentoj pri muldmaŝinoj. Unu paperujo malfermita, kun malvolvita desegnaĵo, kuŝis surtable antaŭ Maksim. Apude sidis altmerita seruristo Konstantin Arkadjeviĉ Kuzmiĉov kaj "tiris gumon", t. e. provis enkapigi al sia estro nesolveblecon de iu problemo. Iom flanke, ĉe la fenestro sidis Kolja, atente pristudanta nudajn virinojn en ege ĉifita revuo. La revuon li estis ĵus ŝtelinta preskaŭ apude, en la kabineto de Lazar. Tri pliaj liberaj kaj makulkovritaj seĝoj staris apude.
– Sa-aluton! – mire elparolis Maksim kun rideto, kiam en ovriĝanta pordo aperis la ruĝvanga Maŝa kaj super ŝia kapo, malantaŭ ŝi – la pala vizaĝo de Kira. – Eniru, knabinjoj! Kolja, oferu du paĝojn el via revuo por meti sur la seĝojn!
– Krenon al vi, – pace respondis Kolja. – Ne estas mia revuo, mi devas redoni al Lazar.
Maksim leviĝis, tiris el la bretaro iujn desegnaĵojn kaj per ili kovris du seĝojn.
– Sidiĝu, knabinjoj, – li diris. – Mi tuj finos la aferon kun Kostja...
– Ŝajtan' [1], – elparolis Kolja kun paca indigno. – Mi sidas ĉi tije. Mi estas pli frua.

[1] Ŝajtan' – diablo, fiulo (turk.)

Du minutoj pri mia maŝinsegilo, ha?
– Kolja, virinoj venis... – riproĉe diris Maksim. – Sidu trankvile, la revuo estas dika, la virinoj tie estas belaj. Rigardu plu.

Li reokupis sian seĝon kaj rigardis al la seruristo. Tiu malfermis la buŝon por daŭrigi...

– Ne, Kostja, – Maksim levis la manon haltige. – Nun parolu mi. Mi legis specialan psikologian esploron, tre amuzan... Ĉu vi volus scii, kiel agas laboristo, ne deziranta plenumi iun taskon? Estas fakte modela konduto, mi certas.
– Mi scivolas... – Kostja suspekteme gapis al Maksim.
– Do, unue, li provas konvinki la estron, ke la tasko entute ne estas plenumebla. Tion vi provis, sed ne sukcesis...
– Hm... – Kostja movetis la ŝultrojn.
– Due, li provas sugestii al la estro, ke jes, la tasko estas plenumebla, sed ne nun. Ankaŭ tion vi diris ĵus, ĉu ne?

La seruristo malvolonte kapjesis.

– Kaj trie, se ankaŭ tio ne estas akceptita, li ekasertas al la estro, ke jes, la tasko estas plenumebla eĉ nun, sed ĝin povas bone fari iu ajn alia. Do ne perdu tempon por aŭdigi la trian parton, prefere diru, por kio vi bezonas liberigon nun...
– Sagaca vi estas, ĉefo! – ravite elparolis Kostja. – Mi bezonas terpomojn... Per nepotismo mi sukcesis aĉeti kvar sakojn en Antonovskij-sovĥozo[1] – hodiaŭ ili promesis venigi ĝin al mia hejmo. Mi devas esti tie, alie ili foriros reen kun miaj terpomoj! Se mi havus propran parcelon... mi jam delonge lasis la petskribon...
– Ankaŭ mi, – diris Maksim kontente. – Sed vian kaŭzon vi devintus diri tuj, dekomence. – Anstataŭ konfesi sincere, vi dum dek kvin minutoj nudelojn pendigas sur miajn orelojn! Alivestiĝu kaj veturu. Mi riparos mem...
– Paĉjo kara vi estas por mi! – sincere eksklamaciis Kostja. – Certe mi helpos! Ĉu mi rajtas foriri? – Li haste leviĝis.
– Ne, ne-e! – elkantis Maŝa. – Du minutojn, Konstantin Arkadjeviĉ! Ni devas enketi vin antaŭ via foriro.
– Pri kio do? – demandis Kostja.
– Ĉu vi ne estas informita, Konstantin Arkadjeviĉ? – diris Kira, montrante ekmiron per levo de la mince ordigitaj brovoj. – Baldaŭ “Rusoplast” estos privata entrepreno. Kaj vi estos unu el la mastroj.
– Ĉu vere? – diris Kostja kaj denove sidiĝis. – Tio al mi plaĉas. Nu-nu?
– Ĉu vi kaj viaj familianoj jam ricevis la vaŭĉerojn? – demandis Kira, dum Maŝa estis preparanta paperojn.
– Jes. Certe jes, – diris Kostja. – Mi eĉ volis jam fordoni la mian kontraŭ du boteloj...
– Ne di-iru tion, Konstantin Arka-adjeviĉ! – kante eksklamaciis Maŝa. – Neniu kredos, ke nia plej konscia reprezenta-anto de laborula kla-aso kapablas fari stultan a-agon!
– Ŝercas mi, – diris Kostja. – Do rapide rakontu, kion mi devas fari. Ĉar mi ne havas tempon...

---

[1] Sovĥozo – ŝtata agrikultura entrepreno en Sovetio.

Kira faris profundan enspiron, preparante sin por klarigoj, kaj diris tre serioze:
– Do. Post la privatigo nia uzino iĝos malfermita akcia societo. Kontrolstoko de la akcioj estas distribuenda inter la dungitaro de la uzino. Nur por la niaj, por ke ni kune havu plimulton ĉe akceptado de la decidoj. Nun vi nur devas diri al ni, kiom da akcioj de nia uzino vi ŝatus akiri... kontraŭ viaj vaŭĉeroj.
– Sed kiom da tiuj estos entute? – rapide demandis Kostja.
– Dek mil, – same rapide respondis Kira. – Do?
– Do... do por kio mi bezonas ilin? – subite demandis Kostja.
Kira ĵetis al li longan ekmiran rigardon.
– Ĉu vi ne komprenas?
– Ne... – konfesis Kostja.
– Nu... – diris Kira. – Ankaŭ mi ne bone komprenas. Sed, ekzemple, por voĉdoni dum la kunvenoj de akciposedantoj... Verŝajne ankaŭ por ricevi parton de la entreprena profito...
– Jen! – diris Kostja. – Jen, ekde tiu vorto rakontu pli detale, mi petas.
– Sed kion mi rakontu? – iom ektimis Kira. – Pri kio?
– Pri la profito, – severe diris Kostja, montrante per pli komforta eksido, ke li ne plu rapidas ien ajn. – Vi diris la vorton “profito”. Mi supozas, ke la uzino havis ĝin ankaŭ en antaŭaj jaroj, ha?
– D-do, jes, – necerte respondis Kira.
– Tiuokaze bonvolu diri, kien vi foruzis la antaŭan profiton?
Kira en kompleta ektimo sidis kun buŝo malfermita. Helpe intervenis Maŝa.
– Aj-aj-aj, Konstantin Arkadjeviĉ! – ŝi elsopranis. – Ĉiumonate vi ricevas premion por via bona laboro! Jen estas la uzina profi-ito!
– Ne gluu ĝibulon.[1] – respondis Kostja. – Mi ricevas la premion, jes. Ĝi estas fiksita procento de mia salajro. Sed la profito uzina povas esti diversa, ĉu ne?
– Je-es, – preskaŭ plore eligis Maŝa. – Krom tio en januaro vi ricevas la “dektrian salajron”. Ankaŭ ĝi estas profito. La vivtenado de nia SKE postulas monon – Alevtina dentojn viajn kuracetas sepage...
– Mi komprenis, – diris Kostja, – ke post la privatigo mi ne plu ricevos monatajn premiojn, nek la “dektrian salajron”, nek Alevtinan por kuraci miajn dentojn. Ĉu mi bone komprenis?
– Ĝuste, Kostja, ĝuste vi komprenis, – intervenis Maksim, ĉar ambaŭ knabinjoj silentis. – Ne turmentu la knabinojn.
– Aha, – elspiris la seruristo. – Do, knabinoj, kiom da akcioj vi entute planas vendi en la uzino?
– Kvindek unu procentojn... – pepis Maŝa.
– Kvin mil cent, – konstatis Kostja. – Sekve, por kompensi miajn perdojn, mi devas havi... mi devas havi... versimile, tricent. Aŭ eĉ kvarcent. Jen do, pufulinjo, ĉu vi jam enskribis, ke mi estas Kuzmiĉov Konstantin Arkadjeviĉ? Jes? Nun skribu apude – kvarcent akcioj. Per literoj skribu!
– Jes, Konstantin Arkadjeviĉ, – Kira finfine retrovis kuraĝon por interveni, – ni

[1] Protesta diraĵo, se dum kartludo iu metas netaŭgan karton.

enskribos vian deziron. Sed ĉu vi bone komprenis, ke la akciojn oni rajtas akiri nur kontraŭ la vaŭĉeroj. Viaj tri vaŭĉeroj ne sufiĉos...
– Pri tio ne zorgu, – bruske respondis Kostja. – Jam kelkaj najbaroj proponis al mi la siajn kontraŭ botelo. Ĉu mi devas subskribon meti? Ne? Ĝis revido. Estis agrable konversacii kun vi.

La pordo fermiĝis, kaj Kira eligis suspiron. Ŝi fikse rigardis al Maksim, balancis la kapeton kaj elparolis:
– Nu, Maksim Matvejeviĉ, se ĉiuj viaj subuloj kondutos simile... ni ne foriros vivaj de tie ĉi!
– Sed, knabinoj, neniu vin pelas for de ĉi tie, – ridetis Maksim. – Kolja, ĉu vi ion havas kontraŭ la knabinoj en mia ĉelo?

Kolja, dum la tuta antaŭa parolado sidinta tute senbrue en sia anguleto, vigliĝis.
– Mi ne estas kontraŭ tijo! – li krietis. – Sed, Maksim, kijon pri mia maŝinsegilo? Kaj knabinoj – enskribu pri mi. Nun.
– Ni venos al viaj konstruistoj, Kolja, – rediris Kira. – Ni enskribos vin kun ili.
– Ne, tijo ne bone, – konvinkite diris Kolja. – Se ĉiju postulas kijel Kostja – ne sufiĉe por mi! Skribu nun: Kolja – dudek.

Maksim enrigardis la paperon de Maŝa kaj ekridegis.
– Kion? Kion vi ekvidis? – maltrankviliĝis la knabino.
– Rigardu – kion vi skribas? – plu ridis Maksim.
– Kolja – dudek akcioj... – heziteme diris Maŝa.
– Entute elturmentis la virinon via Kuzmiĉov! – Kira komprenis kaj ankaŭ ekridis, minacante per fingreto. – Maŝeto! Forstreku! Skribu: Amminigalej Sultanberdieviĉ Ĥamitov. Jen tiel. Dudek akcioj...

Ankaŭ Kolja nun ridis.
– Vaj, knabinoj! – li ĝoje frotis la manplatojn. – Ĉijam festo kun vi.
– Ha! – entuziasmiĝis Maksim. – Bonega ideo, Kolja! Knabinoj! En tiu senfesta tempo mi proponas, ke ni kune festetu tuj! Tutegale vi devas enketi ĉiujn miajn ulojn, sed ili jam foriris al manĝejo. Ni havas duonhoron. Do eble ni tagmanĝu kune ĉi tie? Mi havas panon, lardon, kukumetojn peklitajn...
– Bele... – diris Kira. – Sed mi fastas. La unuan fojon panjo min persvadis.
– Pri kio vi parolas, Kira?! – Maŝa levis la kapon supren. – Por vi fastado estas tute senbezona...
– Sed mi estas ortodoksa, – respondis Kira.
– Ankaŭ mi, – ridetis Maŝa. – Sed se via panjo havas tiun kapablon persvadi – ŝi persvadu min!
– Hej do! – gaje respondis Maksim, aŭdinte la disputon. – Ankaŭ guto da alkoholo ne estus grava peko. Mi tuj vokos Lazar – li havas. Por teknikaj bezonoj. Kaj porkaĵon stufitan li kunprenu. Ĉiutage lia edzineto provizas lin por ke li ne perdu la forton.

Li komplote palpebrumis al la knabinjoj. Ankaŭ Kolja provis montri ruzan palpebrumon per ambaŭ okuloj.
– Kukumojn vijajn mi ŝatas... – li diris.
– Nu... – levis la brovojn Kira, aŭdinte pri Lazar. – Se po guto – tio ne malutilos...